


DE IL, P O P O I L A C I N I O

中國報道

2

1986





Neôo

Foto de SJU ÇANGGJUN

Enhavo

Atingoj de Ĉinio en la Sesa Kvinjara Plano	2
La komercaĵa produktado de la ĉina kamparo en disvolviĝo	6
TIBETO HIERAŬ KAJ HODIAŬ (13): Trafiko sur la altebenaĵo	50
MALFERMITAJ URBOJ: Nova havenurbo Bejhaj	16
POR LA 71-A UK: Vin atendas la hotelo Amikeco	20
Sporto kaj Esperanto	25
POR KOMENCANTOJ: Abeloj	47
ESP-NOVAĴOJ	29
Kreskis junaj sportistoj de Ĉinio	10
La ĉina danca konkurso	40
En la "loĝejo de feoj"	48
Hans Andersen en Ĉinio (Daŭrigo)	22
Kanto de la kvar sezonoj (Novelo)	60
Ĉinaj tradiciaj familioj frontas al novaj problemoj	44
EL REALA VIVO DE ĈINIO (Bildoserio)	56
VOJAĜO TRA ĈINIO: Ŝenĵang — la frua ĉefurbo de Ĉing-dinastio	31
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Antikvaj pontoj de Ĉinio	36
POR VIA SANO: Ok sanigaj ekzercoj (I)	62
Pola akrobata trupo en Pekino (Bildoserio)	65
AMUZO	19
ĈINLINGVA KURSO	67
KURANTAJ AFEROJ	26

SUR LA KOVRILO: *Ŭang Mingĝu prezentas manĉuran dancon.* fotoj de **CAJ HAJFENG**

INTERNE DE LA KOVRILO: Neĝo Foto de **SJU ĈANGĜJUN**

INTERNE DE LA DORSKOVRILO: Blue glázurita vazo kun gravurita blanka drako

SUR LA DORSKOVRILO: Post printempa pluvo (Ĉinstila pentraĵo) de **JANG MINGJI**

JARABONTARIFO	Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00		
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalio	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 8.00 US\$ 10.00 Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50											

ATINGOJ DE ĈINIO EN LA SESA KVINJARA PLANO

La Sesa Kvinjara Plano (1981-1985) pri la nacia ekonomio kaj socia disvolviĝo de la Ĉina Popola Respubliko estis la unua bludeseĝnaĵo de la ĉina registaro por kvarobligi la totalan produktovaloron de industrio kaj agrikulturo antaŭ la fino de la nuna jarcento. Ĝi estis ankaŭ la unua kvinjara plano de la nacia ekonomio de Ĉinio, kiu suriris la ĝustan vojon post la fino de la dekjara ĥaoso de la kultura revolucio. En la periodo de la kultura revolucio la ĉina nacia ekonomio preskaŭ disfalis. En 1979 la ĉina registaro decidis turni la gravitan punkton de la tutlanda laboro sur ekono-

Ĉinaj sciencistoj kontrolas fermentadon de penicilina acilazo per genotekniko.



mian konstruadon, vigligi la nacian ekonomion kaj malfermi pordon al eksterlando kaj alprenis serion da gravaj rimedoj por akceli la pliboniĝon de la nacia ekonomio. La ĉefa tasko de la Sesa Kvinjara Plano estis daŭre praktiki la principon "reguligo, reformado, reordigo kaj plialtigo" en la nacia ekonomio, solvi diversajn postlasitajn problemojn malhelpantajn la ekonomian disvolviĝon kaj alpreni efikajn rimedojn por strebi al la ekonomia stabileco kaj certagrada disvolviĝo kaj meti solidan bazon por radikala pliboniĝo de la financa kaj ekonomia situacio kaj por la nacia ekonomio kaj socia disvolviĝo dum la periodo de la Sesa Kvinjara Plano.

Ĝis oktobro 1985 Ĉinio jam superplenumis la ĉefajn taskojn difinitajn de la Sesa Kvinjara Plano. Ĝi atingis okulfrapajn sukcesojn en sia ekonomia konstruado kaj multe ŝanĝis sian ekonomian fizionomion. En la periodo de la Sesa Kvinjara Plano la totala socia produktovaloroj kaj la totala produktovaloroj de industrio kaj agrikulturo pliiĝis meze je pli ol 10% ĉiujare kaj la nacia enspezo meze je ĉ. 10% ĉiujare. Ili ĉiuj multe superis la rapidecon deziratan de la plano. La atingoj de Ĉinio en la Sesa Kvinjara Plano estis jene:


Unue, la agrikultura produktado sin turnis de malrapida kresko al ĉiuflanka disvolviĝo. Dum la 25 jaroj de 1953 ĝis 1978 la agrikulturo de Ĉinio sin trovis en malrapida disvolviĝo kaj ĝia totala produktovaloroj kreskis meze je 3.2% ĉiujare, malrapide kreskis la grena produktokvanto, stagnis kresko de la produktokvanto de kotono, oleonaj kaj aliaj industriaj plantoj. Dank' al la plua reformado de ekonomia strukturo kaj praktikado de serio da ĝustaj kamparaj ekonomiaj politikoj ekde 1979, rapide kreskis la agrikultura produktado kaj senprecedence prosperis la kampara ekonomio. Oni taksis, ke en la periodo de la Sesa Kvinjara Plano la totala produktovaloroj de agri-

*Konstruado
en Tibeto*



kulturo kreskis meze je 10% ĉiujare (inkl. de la produktovaloro de la vilaĝa industrio). En 1984 la grena produktokvanto atingis 407 300 000 tunojn, je 86 750 000 tunoj pli multe ol en 1980, kun meza jara kresko de 21 700 000 tunoj, t.e. 3.9-oble de la meza jara kresko inter 1953 kaj 1980. La kotona produktokvanto atingis 6 258 000 tunojn, je 3 551 500 tunoj pli multe ol en 1980, kun meza jara kresko de 887 500 tunoj, t.e. 18-oble de la meza jara kresko inter 1953 kaj 1980. Multe pliproduktiĝis ankaŭ oledonaj kaj sukeraĵ

La grena prilaborado en la kamparo de Siĉŭan-provinco tre viglas post riĉa rikolto de greno. Jen kamparanino sekigas vermiĉelojn.



plantoj, juto, tabako kaj aliaj industriaĵoj. Dum la longa pasinta tempo al Ĉinio mankis ĉefaj agrikulturaj produktaĵoj, kio tamen radikale ŝanĝiĝis. Nun Ĉinio povas solvi la problemon de sia miliardo da loĝantoj pri vestoj kaj manĝaĵo. Dank' al la sinsekvaj riĉaj rikoltoj evidente ŝanĝiĝis la neracia agrikultura strukturo. En la totala socia produktovaloro de la ĉina kamparo leviĝis la procentoj de industrio, konstruado, transportado kaj komerco. La kampara ekonomio suriris la vojon por-varan, specialigan kaj modernigan, kio metis pli solidan bazon por la disvolviĝo de la nacia ekonomio.

Due, akordiĝis la ĉefaj proporcioj en la nacia ekonomio. Tio montriĝis jene: (A) Antaŭe agrikulturo kaj malpeza industrio ĉiam postiĝis post peza industrio, kaj nun la afero aliiĝis. Inter 1979 kaj 1984 agrikulturo kaj malpeza industrio ĉiujare kreskis meze je 9.4% kaj 11.7% respektive, kiuj multe superis la jaran mezan kreskon de 6.6% en peza industrio. La produktovaloro de agrikulturo kaj malpeza industrio konsistigis 65.7% de tiu de industrio kaj agrikulturo en 1984, kaj en 1978 nur 58.9%, dume malleviĝis la procento de peza industrio. (B) La proporcia rilato inter aku-

mulo kaj konsumo fariĝis kompare harmonia. Dank' al la ekonomia reordigo komencita en 1979, la proporcio de la konsumata kapitalo kaj akumula kapitalo en la nacia enspezo ŝanĝiĝis de 63.5:36.5 en 1978 al 68.8:31.2 en 1984, tiel ke oni solvis la problemon de troa akumulo dum longa tempo. La neprodukta akumulo en la akumula kapitalo kreskis rapide, kio akcelis la konstruadon de loĝdomoj, urbo-konstruadon kaj la aferojn de kulturo, eduko, sanprotekto kaj sporto. (C) Raciigis la proporciojn inter agrikulturo, peza kaj malpeza industrioj. Rapide progresis komerco, trinkaĵ- kaj manĝaĵ-venado, servado, publikutilaj aferoj, financo, assekuro k.a. De 1980 ĝis 1984 la totala produktov valoro de la terciara industrio kreskis meze je 11% ĉiujare, kio multe superis la mezan jaran kreskon de 5.3% en la pasintaj 28 jaroj de 1953 ĝis 1980.

Trie, rapide pliboniĝis la financa situacio de la ŝtato. Ekde 1981 Ĉinio kovris tian grandan deficon, kia aperis en 1979 kaj 1980. Ekde 1982 komencis kreski la financa enspezo kaj Ĉinio tenis ĝeneralan ekvilibron de en- kaj elspezoj sub la kondiĉo garantii la necesan kreskon de la diversaj elspezoj. En 1985 plue pliboniĝis la financa situacio de la ŝtato. Laŭ takso la financa enspezo de 1985 estis 170 miliardoj da jŭanoj (ĉ. tri jŭanoj egalas unu usonan dolaron). Kun la eksterbudĝetaj sumoj posedataj de la lokaj institucioj, departementoj kaj entreprenoj kiel aldono, la totala enspezo superis 300 miliardojn da jŭanoj, proksimume duoble de tiu en 1980. Tio montris la grandigon de la ekonomia forto de Ĉinio.


Kvare, oni intensigis la gravan konstruadon pri energio, trafiko kaj krudmaterialoj kaj disvolvis ankaŭ la ordinaran konstruadon. En la periodo de la Sesa Kvinjara Plano estis superplenumita la plano pri fundament-konstrua investo kaj investo por la renoviga konstruado en la tutpopolaj entreprenoj. Plifortiĝis la energia industrio, kiu estis malforta dum longa tempo. La investo por la fundamenta konstruado en la sesa jarkvino atingis 70.5 miliardojn da jŭanoj, kaj sekve de tio naskiĝis rimarkinde granda produktiveco. La totala kapacito de la nove instalitaj generatoroj estis 19.6 milionoj da kilovattoj, je 6.7 milionoj da kilovattoj pli multe ol tiu difinita de la plano. La nove pliiĝita karboekspluata kapablo atingis 84.6 milionojn da tunoj, je 4.6 milionoj da tunoj pli multe ol tiu difinita de la plano. La nove pliiĝita naftoekspluata kapablo atingis 44.9 milionojn da tunoj, je 9.9 milionoj da tunoj pli multe ol tiu difinita de la plano. En la unuaj kvar jaroj de la sesa

jarkvino oni funkciigis 42 grandajn kaj mezgrandajn hidro- kaj termoelektrajn, 68 grandajn kaj mezgrandajn karbominejojn. La normoj difinitaj de la plano por 1985 pri la transportokvanto de fervojoj, ŝoseoj, akvovojoj, aerlinioj, tuboj kaj la en- kaj elŝipigita kvanto de apudmaraj havenoj estis plenumitaj je unu jaro antaŭ la templa. Oni plenumis aŭ superplenumis la planon pri la nove pliiĝita produktiveco de cemento, laminitaj ŝtal-produktoj, kemiaj fibroj, sukero, spindeloj, salo, sinteza amoniako, fosfora sterko, etileno kaj aliaj.

Kvine, rapide disvolviĝis scienco kaj eduko. En la periodo de la Sesa Kvinjara Plano mallongiĝis la distanco inter la nivelo de Ĉinio kaj tiu de avangardaj landoj en iuj gravaj kaj urĝe bezonataj fakoj de scienco kaj teknologio. Certagrade progresis la teknologio de iuj ĉefaj ĉinaj entreprenoj. Iuj ĉefaj teknikoj de Ĉinio jam proksimiĝis al la monda avangarda nivelo aŭ atingis ĝin. Ĉinio sukcese lanĉis transportajn raketojn al difinita loko profunde de Pacifiko kaj faris tion el sub la akvo. Ĉinio sukcese elfaris la superkomputilon "Lakta Vojo" povantan fari cent milionojn da operacioj sekunde kaj sukcese lanĉis eksperimentan komunikant sateliton al difinita punkto. En 1985 Ĉinio akceptis 44 000 esplor-studentojn, kaj en lernejoj estis 58 000 tiaj studentoj. Tiujare Ĉinio akceptis 600 000 lernantojn en altlernejoj, kaj en lernejoj estis 1 680 000 studentoj kaj en mezgradaj teknikaj lernejoj 1 540 000 lernantoj. La ciferoj superis la normojn difinitajn de la plano por 1985. Daŭre iris la reformado de la strukturo de la mezgrada edukado kaj rapide disvolviĝis la teknika edukado al diversaj laboristoj kaj oficistoj.

Sese, evidente leviĝis la vivnivelo de la urbaj kaj kamparaj loĝantoj. En la periodo de la Sesa Kvinjara Plano pli ol 30 milionoj da homoj ekhavis okupon. La salajro de la tutlanda laboristaro kaj oficistaro pliiĝis je 50% post dekalkulo de la diferenco kaŭzita de prezleviĝo, ĉiu meze je pli ol 20%. La neta enspezo de la kamparanoj kreskis meze je 80%. En 1984 ĉiu loĝanto de nia lando konsumis meze 327 jŭanojn. Kalkulate laŭ fiksa prezaro, la konsumo de 1980 ĝis 1984 kreskis ĉiujare je 7.8%, kio multe superis la deziratan kreskon de 4.1%. La vivnivelo de la urbaj kaj kamparaj loĝantoj senprecedence leviĝis.

Sepe, oftigis la ekonomia kontakto kun fremdaj landoj. En la sesa jarkvino viglis la ekstera komerco de Ĉinio. En la unuaj kvar jaroj (1981-1984) la totala sumo de eksportado estis 89.3



Pluruza agrikultura maŝino de tipo 25 kun marko "Ora Drako" produktita de la Gujlin-a Maŝina Fabriko en Gŭangŝji

miliardoj da usonaj dolaroj kaj tiu de importado 80.9 miliardoj da usonaj dolaroj. En 1985 multe kreskis la eksportado kaj importado. La specialaj ekonomiaj distriktoj kaj malfermitaj marbordaj urboj ludis pli kaj pli gravan rolon en uzo de fremdlandaj kapitaloj kaj importo de avangarda teknologio eksterlanda. Inter 1979 kaj 1984 Ĉinio uzis eksterlandajn kapitalojn de 17 miliardoj da usonaj dolaroj per diversaj manieroj. Ĝi multe disvolvis ankaŭ la laŭkontraktan konstruadon kaj laborulan kunlaboron kun aliaj landoj. Ĝi subskribis tiuflankajn kontraktojn kun pli ol 60 landoj kaj regionoj.

Resume, dank' al nia penado en la periodo de la Sesa Kvinjara Plano, plenumiĝis nia tasko por radikala pliboniĝo de la financa kaj ekonomia situacio. Ĉinio konsiderinde progresis en la refor-

mado de la ekonomia administra sistemo. La nacia ekonomio daŭre, stabile kaj harmonie disvolviĝas, kaj ekonomia cirkulado estas en bela perspektivo. Surbaze de tio, la reformado kaj konstruado en la periodo de la Sepa Kvinjara Plano certe atingos pli da sukcesoj. Nun en Ĉinio estas malfortaj la materia bazo de la ekonomia kaj socia disvolviĝo kaj tiu de agrikulturo. La inteligenta ekspluato kaj kulturado de talentuloj ankoraŭ ne konformas al nia ekonomia konstruado. Nun en niaj ekonomiaj aferoj ekzistas serio da problemoj, kiaj malrapida leviĝo de la ekonomia efiko, malrapida progreso de la produkta teknologio, malalta nivelo de la ekonomia administrado kaj neracia strukturo de la produktaĵoj kaj industria branĉoj. Tiuj problemoj devas esti solvitaj en la periodo de la Sepa Kvinjara Plano, kiu komenciĝis en 1986.

La komercaĵa produktado de la ĉina kamparo en disvolviĝo

En la lastaj jaroj en la ĉina kamparo aperis okulfrapa ŝanĝiĝo, ke kamparanoj vendis en bazaroj pli kaj pli da siaj produktaĵoj, kiujn ili konsumis plejparte en la pasinteco.

Laŭ la statistiko de la Ŝtata Statistika Buroo, de 1979, la totala monsumo ricevita de la kamparanoj en vendo de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj kaj industriaĵoj pliiĝis je ĉ. 10% ĉiujare. En 1984 la monsumo atingis

264.71 miliardojn da jŭanoj (ĉ. 3 jŭanoj egalas unu usonan dolaron), je 54.41 miliardoj da jŭanoj pli multe ol tiu en 1983, ĉiu kamparano meznombro vendis komercaĵojn en ekvivalento de 314 jŭanoj. En la vilaĝoj de la apudmaraj provincoj kun kompare rapida ekonomia disvolviĝo la komercaĵoj eĉ atingis 80% de la produktaĵoj. Tio montris, ke la ĉina kamparo transiras de la ekonomio memproviza kaj duon-

memproviza al tiu de la komercaĵa produktado, de la tradicia agrikulturo al la moderna. Ni prenu kiel ekzemplon la ordinaran vilaĝon Dongŝage en antaŭurbo de Pekino.

La vilaĝo kun 183 familioj situas en la gubernio Ĉangping. Kiel aliaj vilaĝoj de Ĉinio, preskaŭ ĉiuj ĝiaj 350 laborfortoj okupiĝis pri kamplaboroj en la pasinteco. Ĉiujare ili vendis al la ŝtato nenion alian ol malgrandajn

Lignaj siteloj produktitaj en la kamparo de Ĝeĝjang-provinco



kvantojn da greno, fruktoj kaj porkoj.

En la komenco de 1983 la vilaĝo faris reformon. Ĝiaj pli ol 100 laborfortoj laŭkontrakte kulturas ĝiajn 113 hektarojn da agroj, kaj la aliaj faras kokobredadon kaj laboras en fabrikoj funkciigataj de la vilaĝo aŭ subdistrikto. Nun ĝi bredas pli ol 30 000 kokinojn, el kiuj 1 000 estas bredataj de kolektivo, kaj ĉiuj aliaj bredataj de familioj. Krom porkoj iuj familioj bredas ankaŭ viandodonajn kokojn, laktobovinojn kaj laktoŝafinojn. Kaj krome, la vilaĝo funkciigas ankaŭ porligno-ŝraŭban fabrikan, aŭtoriparejon, brikejon kaj restoracion.

La kamparanoj de la vilaĝo bredas kokojn ne nur por sia konsumo, sed ĉefe por vendi ovojn kaj viandkokojn. Dank' al la disvolviĝo de la komercaĵa pro-

duktado, precipe de bredado, la vilaĝo vendis siajn produktaĵojn nur je 34% en 1982, sed la venditaj produktaĵoj superis 50% en 1984. La pokapa enspezo kreskis de malpli ol 200 jŭanoj en 1978 al pli ol 800 jŭanoj en 1985. En la lastaj jaroj la vilaĝo aĉetis per monsumo enspezita el kokobredado du kombajnojn kaj aliajn agrikulturilojn.

Ĉiuj vilaĝoj en la ĉina kamparo praktikas produktan respondecan sistemon, kio multe altigis la aktivecon de la kamparanoj en produktado. Ne nur la produktado de greno kaj kotono atingis impetan disvolviĝon, sed ankaŭ granda nombro da superflujaj laborfortoj komencis okupiĝi pri produktado de oledonaj plantoj, legomoj, fruktoj kaj akvoproduktaĵoj, pri diversa bredado kaj prilaborado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, pri ko-

mercado, transportado, konstruado, industrio de konstruaj materialoj kaj diversaj servoj. Kiel produktantoj de komercaĵoj de Ĉinio, specialigitaj kamparanaj familioj aperas unuj post aliaj. 24.8 milionoj da tiaj familioj tamen kreis laborproduktivecon kelkoble, eĉ dekkelkoble pli altan ol tiu kreita de lokaj ordinaraj kamparanoj. En 1984 iuj specialigitaj grenproduktaj familioj vendis ĉiu al la ŝtato pli ol 100 000 kg. da greno; iuj specialigitaj bovobredaj familioj vendis ĉiu 50—100 tunojn da freŝa lakto; kaj iuj specialigitaj anasobredaj familioj vendis ĉiu pli ol 47 000 kg. da ovoj. Iu specialigita porkobreda familio en antaŭurbo de Fuĝoŭ vendis en 14 monatoj al la ŝtato 1 178 porkojn. En la sama jaro la komerca greno de Ĝjilin-provinco atingis 53% de la grena produktokvanto. La komercaĵoj el la agrikulturaĵoj

Laboristino de fabriko de Tang-stilaj trikoloraj ceramikaĵoj en Gongŝjan-gubernio, Henan-provinco, kontrolas produktaĵojn.



Maiza sunumejo de specialigita kamparana familio



de Ĉinio kreskis de 20-30% preskaŭ en ĉiu pasinta jaro al 55%.

La cirkulado de komercaĵoj en la kamparo rompita la situacion, ke la ŝtato monopoligis la komer-

caĵan interŝanĝon. La komercaĵa interŝanĝo farita de kamparanoj komencis vigan periodon, en kiu kunekzistas pluraj ekonomiaj formoj kaj pluraj entreprenaj formoj de la ŝtato, kolektivo kaj indivi-

duo. Ĝis la fino de 1984 en la tuta lando estis 50 300 foiroj, inter kiuj iuj funkciis ĉiutage, aliaj en ĉiu dua aŭ tria tago, kio faciligis al kamparanoj vendi siajn produktaĵojn en proksimaj foiroj. Nun funkcias ankaŭ landskalaj komerca centro de butonoj, poliakrilonitrila tekstila centro, prilabora centro de sakoj el artefarita lado, prilabora centro de vestoj, ludil-fara centro ktp en la iam malriĉaj lokoj. Dank' al ĉio ĉi tio ekcirkulas ankaŭ laborfortoj, teknikoj kaj kapitalo. En kamparo aperas entreprenoj kombinitaj de tekniko de urbaj sciencistoj kun kapitalo de kamparanoj kaj ankaŭ en urboj vendejoj, fabrikoj kaj hoteloj funkciigataj de kamparanoj.

Fiŝlageto en la vilaĝo Dongŝageĝuang



Akceli la disvolviĝon de la komercaĵa produktado en la ĉina kamparo estas tasko ne nur de la kamparanoj, sed ankaŭ de ĉiuj ekonomiaj branĉoj en Ĉinio. La ŝtataj transportaj entreprenoj de la provincoj Hebej, Ŝanŝji kaj Ĝjangŝji transportis produktaĵojn

Jen unu el la ĉambroj de hotelo konstruita per kamparana investo. Tiu ĉambro havas areon de 30 kvadrataj metroj.



por kamparanoj. Iuj gubernioj en la delto de la Perla Rivero en la provinco Gŭangdong kolektis monon por konstrui ŝoseojn kaj pontojn por plibonigi trafikajn kondiĉojn. Multaj gubernioj establis esplorajn centrojn pri komercaĵa produktado, kiuj kolektas ekskluzive informojn pri komercaĵoj de diversaj lokoj por direkti sialokan komercaĵan produktadon.

La transiro de la unuopa agrikultura ekonomio al plurspeca entreprenado kaj urbetaj entreprenoj ŝanĝis la konsiston de laborfortoj en la kamparo. Ĝis 1984 en la tuta lando pli ol 31 milinoj da kamparaj laborfortoj laboris en urbetaj entreprenoj kaj fariĝis kamparanaj laboristoj. En Ĝjansu sesono de la plenkreskaj kamparanoj laboras en urbetaj entreprenoj. En Ĝeĝjang 7.52 milionoj da laborfortoj forlasis kampojn kaj okupiĝas pri industria, metia produktado kaj kromproduktoj. Kun pliiĝo de tiaj kamparanoj grandnombraj agroj estas laŭkontrakte kulturataj de specialigitaj agrikulturaj familioj, kio prezentas brilan perspektivon por kolektiva entreprenado de agrikulturo kaj akiri pli grandan profiton.

En 1985 la ĉina registaro decidis reformi la sistemon, laŭ kiu la ŝtato monopoligas la aĉetadon de agrikulturaj produktaĵoj, kaj difinis, ke la ŝtato aĉetas laŭ interkonsento nur malgrandan kvanton da agrikulturaj produktaĵoj, kaj la kamparanoj povas libere vendi la ceterajn produktaĵojn laŭ principo de merkata reguligo direktata de la ŝtata plano. La reformo kondukis la kampulojn, kiuj dum longa tempo okupiĝis nur pri grena produktado, al la disvolva vojo de komercaĵa ekonomio. Tiujare, kiam komenciĝis printempa kulturado, granda

nombro da kamparanoj torentis sur urbajn kaj kamparajn foirojn por akiri ekonomiajn informojn kaj subskribi aĉetajn kaj vendajn kontraktojn kun koncernaj fakoj, por reguligi la konsiston de produktaĵoj laŭ la bezono de merkato kaj fari printempan kulturadon. Laŭ siaj konkretaj kondiĉoj diversaj lokoj reduktis kulturatan areon por greno kaj plivastigis tiun por ekonomiaj plantoj. Multaj lokoj reduktis kulturatan areon por malbonkvalitaj rizo, maizo kaj batato malfacile vendataj en merkato kaj plivastigis tiun por bonkvalitaj rizo, tritiko kaj senak-

ve kulturaj rizplantoj kaj pliprofitaj verdaj faboj kaj milio. Iuj provincoj aktive produktas bonkvalitajn, altprezajn kaj debitajn aroman rizon, nigran rizon, sangruĝan glurizon kaj olegluecan rizon. En la kotonkultura regiono oni ne nur reduktis la kotonkulturan areon je 1.7 milionoj da hektaroj, sed ankaŭ vaste aplikis bonspeciajn semojn por plibonigi la kvaliton kaj altigi la kvanton de agrikulturaj produktaĵoj.



Kreskis junaj sportistoj de Ĉinio

Oktobre de 1985 okazis en Henan-provinco la Unua Ĉina Geknaba Sportkunveno. Kiel raportisto de nia revuo mi vojaĝis al la provinco por intervjuo.

La provinco situas ĉe la koro de Ĉinio kaj ĝian nordan parton trafluas de okcidento la Flava Rivero, la dua granda rivero en Ĉinio. La loko estis lulilo de la antikva ĉina kulturo kaj havas brilan historion kaj belajn vidindejojn. Dum la pasintaj pli ol 30 jaroj oni aranĝis en la provinco neniun landskalan aktivadon, krom la Unua Ĉina Geknaba Sportkunveno. Do, la sportkunveno fariĝis kompreneble granda evento por la loko. La provinca ĉefurbo Ĝengĝoŭ kaj aliaj urboj Lŭojang, Kajfeng, Ĝjaŭzŭo kaj

Ŝinŝjang estis plenaj de festa etoso. Iliaj ĉefaj stratoj estis ornamitaj per belkoloraj flagoj kaj rubandoj por saluti sportistojn el diversaj partoj de la lando. La grandaj okulfrapaj bildoj kaj memoraĵoj kun la emblemo de la sportkunveno montris al la ĉeestantoj, ke oni delonge atendis ilin.

BONAJ SUKCESOJ

La sportkunveno malfermiĝis je la 6-a de oktobro. La sekvan tagon komenciĝis ĝia konkurso. La kunveno havis 17 sportobranĉojn. Pro la klimata kaŭzo oni jam en la somero okazigis konkurson pri naĝo, plonĝo, vetremado kaj aliaj du sportobranĉoj. Tiel 12 sportobranĉojn oni

devis plenumi en la oktobra sportkunveno. Antaŭ tio oni faris landskalan antaŭkonkurson pri la 12 sportobranĉoj, kaj la sportkunvenon rajtis partopreni nur la unuaj ok elstaraj sportistoj en ĉiu sportobranĉo, tiel ke venis al Henan-provinco pli ol 2 800 sportistoj.

Posttagmeze de la unua tago la 17-jara halter-levisto He Ĝŭo-ĉjang el Ĝuangdong-provinco akiris bonan sukceson. Li pezis nur 48 kilogramojn, tamen ŝirlevis 102.5 kilogramojn kaj brustolevis 132.5 kilogramojn, kaj per sia totala pezo de 235 kilogramoj li atingis la mondan avangardan nivelon de halterlevo je la 60-kilogramo pezkategorio. Kiel

Sportistoj (en malhelaj vestoj) de Henan-provinco gajnis la piedpilkon ĉampionecon per ĉiuj kvin venkoj.



kamparana filo de suda Ĉinio, li gajnis la unuan oran medalon en la sportkunveno.

Alian ĝojindan sukceson akiris 15-jara knabino en la sesa tago. Ŝi plenumis sume 589 cirklounuojn en la 60-pafa koncentra pafo per norma pistolo, je tri cirklounuoj pli multe ol soveta pafistino, kiu kreis en la monda geknaba pafa konkurso en la lasta septembro, kaj je kvar cirklounuoj pli multe ol tiu, kiu gajnis la oran medalon en la pafa konkurso en la 23-aj Olimpikoj. Kun grandaj brilaj okuloj kaj mallongaj haroj, ŝi venis el la plej granda ĉina urbo Ŝanhajo. Ŝi unuafoje partoprenis en la landskala konkurso. Ŝian talenton oni rimarkis en amuza kunveno de ŝia lernejo. En la amuza kunveno ŝi unuafoje faris belajn trafojn per aerfusilo kaj post nelonge ŝia instruisto proponis ŝin al postlecionara sporta lernejo. Du tagojn antaŭ tio ŝi jam gajnis la oran medalon por la virina aerpistola pafo.

En atletiko la 16-jara sportisto Ĝang Jan el Ĝuangdong-provinco transsaltis la 2.06-metran alton kaj la 15-jara Ni Taŭ el Pekino la 2.03-metran alton. En la antaŭkonkurso Ni Taŭ gajnis la unuan lokon per transsalto de 2.10 metroj. En la finalo li ne adaptiĝis al la pluveta tago. Specialistoj diris, ke li, alta je 1.89 metroj, estas multesperiga.

En la plonĝa konkurso okazinta jam en aŭgusto la 15-jara U Fejlong el Ĝuangŝji-regiono prezentis turoplonĝon de plentorda 4.5-obla saltumo antaŭen (vicnumero 109/C) kaj per tio fariĝis la kvara plonĝisto en la mondo, kiu plenumis tian malfacilan saltumon. Ĉiuj liaj ses saltumoj, inkluzive la supre menciitan, estis pli malfacilaj je 0.2 grado ol tiuj faritaj de la usona "aera heroo".

La moderna gimnastiko trovis siajn amantojn per kombino de sporto kaj arto. La konkurson pri tiu sportobranĉo oni aranĝis

en la urbo Ĝjaŭzŭo en norda Henan-provinco, 80 kilometrojn for de ĝia ĉefurbo. La magistrato de Ĝjaŭzŭo konstruigis novan sporthalon kiel konkursejon. La gimnastikan konkurson partoprenis 11-16-jaraj geknaboj. Kvan-kam naivaj, ili estis elstaraj en konkurso. Sportistino Ŭang Hujing el Tjanĝin bele kaj lerte prezentis en grundgimnastiko serion de sentorda duobla transkapiĝo malantaŭen kaj 720-gradan korpturniĝon tuj post plia transkapiĝo malantaŭen. Ĉiuj ses juĝistoj senescepte donis al ŝi 9.9 poentojn.

ĜUANGDONG-PROVINCO GAJNIS PLEJ MULTAJN ORAJN MEDALOJN

La finalojn en Henan-provinco partoprenis ne nur la teamoj de 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, sed ankaŭ la teamo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj la fervojista teamo "Lokomotivo". Post la 11-taga

Rigardantoj de piedpilka konkurso



intensa konkurso la teamo de la plej suda ĉina provinco Gŭang-dong gajnis plej multe da oraj medaloj, t.e., 40 el la 262 de la sportkunveno. Estis okulfrapaj ĝiaj sukcesoj en halterlevo kaj atletiko, i.a. ĝi gajnis ok orajn medalojn en la halterleva konkurso, t. e., pli ol trionon de la 21 oraj medaloj por halterlevo, kaj 18 orajn medalojn en la atletika konkurso, t.e., pli ol kvaronon de la 68 oraj medaloj por atletiko. Videble, ĝi estis pli altnivela ol tiuj de aliaj provincoj kaj municipoj. La teamo de Ŝanhajo kun 26 oraj medaloj okupis la duan lokon. Kaj la teamo de Hebej-provinco ricevis la trian lokon per 24 oraj medaloj. La kvinan lokon gajnis la teamo de Henan-provinco, la gastiganto de la kunveno, nur post la teamo de Ljaŭning-provinco. En la antaŭaj landskalaj konkursoj Henan-provinco atingis ne tiel bonajn sukcesojn. Ĉi-foje ĝiaj sportistoj estis aparte favorataj de bone konataj naturaj kondiĉoj. Nemalmultaj el ili montriĝis bravaj en la konkurso. Ekzemple, la 15-jara gimnasto Cuj Juĉeng per brila prezentado gajnis por sia teamo du orajn medalojn de duringado kaj ĉevalado. La piedpilka teamo de Henan-provinco venkis ĉiujn siajn rivalojn en la konkurso kaj per tio gajnis la lastan oran medalon de la sportkunveno. Oni vidis, ke Henan-provinco faris senmankan preparan laboron por gastigi la sportistojn el diversaj lokoj de la lando kaj ankaŭ bone prepariĝis por gajni medalojn.

PROMESPLENAJ NOVAJ SPORTISTOJ

En la skerma konkursejo sub la nokta lamplumo konkursis en streĉa etoso du sportistinoj en blankaj skermistaj vestoj kaj kasako kaj kun skermilo enmane. Jen la finalo pri la ĉampioneco de

virina rapirado. Se la konkursantaj knabinoj ne estus prezentitaj anticipe, ili estus malfacile rekonblaj. Ili, unu alta kaj la alia malpli alta, luktis plenforte. Ambaŭ havis la saman celon strebi al la ĉampioneco. Fine la alta profitis de sia statura avantaĝo kaj venkis la kontraŭulon. Ĉampioniĝis la 17-jara Ĝu Jan el Ĝjansu-provinco. Kaj la duan lokon ricevis la 16-jara Ĝu Ju el la sama provinco. Lukto inter membroj de sama teamo pro ĉampioneco estis ŝajne netolerebla, sed el tio videblis la nivelo de virina rapirado de Ĝjansu-provinco. Kvankam Ĝu Ju gajnis nur la subĉampionecon, tamen ŝi skermis sobre, vigle kaj lerte kaj venkis ĉiujn siajn rivalojn, inkluzive de Ĝu Jan, en la antaŭkonkurso. Sed en la finalo puŝiĝis ŝia ludanta brako, kaj pro tio ŝi ne povis plene disvolvi sian teknikon. Inter la rapiristinoj de Ĝjansu-provinco troviĝis la 17-jara elstara novico Lŭan Hongŭej, fratino de Lŭan Ĝjuĝje, la ĉampiono de la virina rapirado de la 23-aj Olimpikoj. La lasta jam famiĝis inter la mondaj skermistoj. Lŭan Hongŭej intencis elmontri sian talenton kiel ŝi. En la antaŭkonkurso ŝi bone skermis, kaj en la finalo ŝi renkontis fortan kontraŭulon kaj pro konfuziteco ŝi ne povis teni sin aplombe, kvankam ŝia fratino estis apude por aplaŭdi ŝin. En la dua rondo de la finalo ŝi haste atakis por gajno. Fine ŝi estis venkita de sportistino el Henan-provinco, kiu estis pli aplomba ol ŝi.

El la sportistoj partoprenantaj tiun sportkunvenon la plej junaj estis gimnastoj kaj plonĝistoj. Ili aĝis ĝenerale 11-15 jarojn.

Ĝoŭ Ĝing el Hunan-provinco, kiu gajnis la ĉampionecon de vira kunmetita gimnastika konkurso,

estis nur 15-jara. Tiu bela knabo de suda Ĉinio estis stabila, deteniĝema kaj kuraĝa en provado de malfacilaj movoj. Estis originalaj liaj rapida surreka prezentado, sinsekvaj transkapiĝoj sur tapiŝo kaj Tomas-rotacio sur ĉevalo. Oni diris, ke li estas la plej elstara el la novaj gimnastoj de Ĉinio.

En la plonĝa konkurso okazinta en aŭgusto estis aparte atentata knabino, kiu gajnis la sesan lokon de la virina saltotabuloplonaĝo, ĉar ŝi havis nur 11 jarojn. Ŝi nomiĝas Ĉen Ŝjaŭdan, el la sudorienta apudmara provinco Fuĝjan. Jam en sia 8-jara aĝo ŝi eklernis plonĝi. Unuafoje vidinte ŝin, ŝia trejnisto demandis: "Ĉu vi scias naĝi?" "Jes." "Ĉu vi kuraĝas plonĝi?" redemandis la trejnisto, montrante al naĝbaseno. "Jes!" ŝi donis la saman respondon kaj tuj plonĝis en la akvon. Hodiaŭ ŝi estas la plej juna el la elstaraj ĉinaj sportistoj.


ESTONTA MALFACILA VOJO

Je la 18-a de oktobro finiĝis la Unua Ĉina Geknaba Sportkunveno. Ĝi rompis kvin landajn rekordojn, dek landajn rekordojn de junuloj kaj 17 landajn rekordojn de knaboj. La gajnintoj de la unua loko en la vira lancoĵeto kaj trisalto estis pli eminentaj ol tiuj de la Azia Atletika Ĉampioneca Konkurso okazinta en 1985.


La nuna sportkunveno estis revuo al la sporta nivelo de la ĉinaj geknaboj. Fakuloj opiniis post la 11-taga observado, ke ekzistas en Ĉinio esperigaj junaj sportistoj ĉefe halterlevaj, pafaj, gimnastikaj kaj plonĝaj, sed ne multaj. Ĝenerale, ne estas alta la sporta nivelo de la ĉinaj geknaboj kaj ili devas iri malfacilan vojon por atingi la mondan avangardan nivelon en ĉiuj sportobranĉoj.



Geknaboj kun kronoj kuras al la stadiono.





He Ĝuoĉjang el Ĝuang-dong gajnis la oran medalon de halterlevo.



La inaŭguro de la Unua Ĉina Geknaba Sportkunveno

La finalo de la virina rapirado



Klasika lukto

*La finalo de la
4×100-metra kuro*






La vira individua konkurso pri 121.22-kilometra biciklado

La finalo de la vira 110-metra barierkuro por la grupo A



Gin Jing el Sanhajo rompis la mondan geknaban rekordon per 589 cirkloj en la virina 60-paĝa pistola konkurso kaj gajnis la oran medalon.



Bejhaj

MALFERMITAJ URBOJ

NOVA HAVENURBO BEJHAJ

Artikolo kaj fotoj de LI ĈJANG



Artisto faras perlamotan bildon.



“Sudaj Perloj” kulturataj de Bejhaj, kiuj estas fame konataj en la mondo



Reveno de fiŝkaptado

La urbo Bejhaj de la Gŭangŝji-a Ĝŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono situas sur duoninsulo en formo de rinocera korno ĉe la suda ekstremo de Ĉinio. Ĝi kovras areon de 275 kvadrataj kilometroj.

Jam en Ĉin-dinastio (221-206 a. K.) la urbo fariĝis komerhaveno de suda Ĉinio, negocis kun diversaj landoj de sudorienta Azio kaj estis startpunkto de la antikva silka marvojo. Nun ĝi konsistas el interna kaj ekstera havenoj. La interna haveno longas je 3.4 kilometroj, kie povas endokiĝi 3 000-tonelaj kargoŝipoj. La ekstera estas natura profunda golfo, kien 20 000-tonelaj kargoŝipoj povas eniri en ajna sezono. La haveno rigardas al sudorienta Azio kaj najbaras kun Hongkong kaj Aŭmen. Tia situo multe faciligas var-importadon kaj eksportadon de la sudokcidentaj provincoj de Ĉinio. Nun la haveno havas komercan rilaton kun pli ol 150 havenoj de 77 landoj kaj regionoj. Post la ekpraktikado de la malferma politiko oni konstruas du ankrejojn por 10 000-tonelaj ŝipoj en akvoprofunda loko de la haveno por levi la martrafikan kapablon. La jara en- kaj elŝipigita kvanto de la haveno atingos pli ol 1.4 milionojn da tunoj, post kiam la ankrejoj estos


finkonstruitaj. La nove konstruita flughaveno Bejhaj prove ekfunkcios printempe de la kuranta jaro. La fervojo de Bejhaj ĝis Ĉinĝoŭ estas preparata. Post ĝia finkonstruo oni povas trajne veturi al Bejhaj de Nanning, la ĉefurbo de la Gŭangŝji-a Ĝŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono.

Bejhaj frontas al la Suda Ĉina Maro, abunda je marproduktaĵoj, kiaj famaj specoj de fiŝoj kaj salikokoj, ĥelonioj, delfenoj, foko kaj balenoj. La Bejhaj-a Perlokulturejo havas historion de pli ol 20 jaroj. La perloj kulturataj de ĝi estas nomataj "sudaj perloj" kaj famaj tra la mondo pro siaj solideco, grandeco, rondec, brileco kaj bonkvaliteco. Perloj estas ne nur multekostaj ornamaĵoj, sed ankaŭ altvaloraj en medicino. La perlopulvoro produktita de la kulturejo estas aparte efika por ku-

raci duodenan ulceron, neŭrastion, anginon k.a.

En la lastaj jaroj rapide disvolviĝis la tiea mara fiŝkaptado kaj akvoproduktaĵa prilaborado. La Bejhaj-a Kompanio de Mara Fiŝkaptado estas kombinato de fiŝkaptado, fridigo, prilaborado kaj transportado. Ĝiaj fridigitaj fiŝoj, aliaj marproduktaĵoj kaj diversaj ladfiŝoj tre plaĉas al ĉinoj kaj eksterlandanoj. La Fiŝhepat-olea Farmacia Fabriko de Bejhaj estas unika en Gŭangŝji. Ĝiaj produktaĵoj estas ne nur multspecaj, sed ankaŭ bonkvalitaj. Inter ili troviĝas fiŝhepata oleo kun momordika frukto, kiu estas fama drogo de Gŭangŝji. Ĝi kun apartaj koloro,odoro kaj gusto estas tonika kaj utila al pulmo kaj korpokresko.

La urbo abundas je mineralaj riĉfontoj. Sub ĝia marbordo estas



Putoboraj platformoj en la petrolriĉa golfo Bejbu



Fiŝepata oleo kun momordika frukto produktita de la urbo

granda rezervo de altranga kvarco, ideala materialo de altklasa vitro. La rezervokvanto de titana fero estas ĉ. 3 milionoj da tunoj kaj la kvalito de titana erco estas la plej bona en Ĉinio. Krome la tieaj asociiĝintaj ercoj povas esti vaste utiligataj kaj pro tio ili havas altan ekspluatan valoron. La akvo de la golfo Bejhaj estas bromoriĉa kaj estas utila por disvolvi maran kemiindustrion. Estas precipe menciinde, ke la olea rezervokvanto en la Suda Ĉina Maro ĉe la urbo, laŭtakse, estas 350-500 milionoj da tunoj. La Petrola Kompanio de Okcidenta Parto de la Suda Ĉina Maro boris kvar altproduktajn oleputojn sur la kontinenta breto 50 marmejlojn for de Bejhaj, kiuj ekproduktos post nelonge.


La industria bazo de Bejhaj antaŭe estis malforta. Tamen dank'

al kelkjara diligenta laborado de la urbo multe progresis la industrioj maŝina, kemia, metalurgia, tekstila, ŝipkonstrua, konstrumateriala, manĝaĵa, medikamenta, papera, ceramika, vitra, plasta kaj metiartaĵa. La aerbloviloj kaj centrifugiloj produktitaj de la Bejhaj-a Aerblovila Fabriko vendiĝas en diversaj lokoj de Ĉinio kaj en Hongkong. La fera-ŝtonaj produktaĵoj de la Bejhaj-a Porcelana Fabriko ĉarmaj, fortikaj kaj belformaj estas ŝatataj de en- kaj eksterlandaj klientoj. La Bejhaj-a Metiartaĵa Fabriko, kiu produktas perlamotajn bildojn kun marko "Ora Drako", estas unu el la tri grandaj farejoj de perlamotaj bildoj de Ĉinio. Ĝi produktas pli ol 2 000 specojn de perlamotaj bildoj el kategorioj de homfiguroj, pejzaĝoj, floroj kaj birdoj, kaj imitaĵoj de antikvaj pentraĵoj. Ili karakteriziĝas per

delikateco, riĉa imago kaj bela aspekto, kaj oni aĉetas ilin kiel ornamaĵon kaj donacon. Ili havas grandan debiton en pli ol 20 landoj de sudorienta Azio, Eŭropo kaj Ameriko.


La urbo situas en subtropika zono. Tie la klimato estas modera kaj malseka. Somere ne estas tre varme pro mara vento kaj vintre ne froste kaj oni eĉ povas preni la marbanon. En la urbo la stratoj estas bonordaj kaj ombraj, kun belaj floroj. La parkoj Hajbin kaj Ĝongŝan kaj marborda naĝejo estas paradizo de turistoj. La Akvoproduktaĵa Domo de Bejhaj estas unu el la du grandaj akvoproduktaĵaj domoj de Ĉinio. Ĝi konsistas el ses eksponejoj kun pli ol 2 800 montraĵoj de pli ol 670 specoj, inter kiuj la plej allogaj estas la skeleto de baleno pli ol 15 tunojn peza, 7-kilogramama palinuro, ĉ. 100-jara viva ĥelonio kun pezo de pli ol 150 kg. kaj granda manato nomata "sireno".

En Bejhaj estas pluraj vidindejoj. Sur la plaĝo Bajhutoŭ, longa je dek kilometroj, la subtila sablo brilas sub la suno, densa verda arbaro staras ĉe marbordo, aero freŝas kaj medio kvietas. La plaĝo estas tre bona subtropika marbanejo, malofte videbla en la mondo. La monto Ĝuantoŭ kvazaŭ



Farejo de aerbloviloj

Manato kaj aliaj marbestoj montataj en la Akvoprodukta Domo



drako etendiĝanta al maro kuŝas ĉe la suda fino de la urbo. Ĝia deklivo krutiĝis pro erozio de marondoj. La muĝanta tajdo kontraŭ la bordo kaj ventbruo en pinaro kune formis imponan naturan melodion. La insuletoj Ŭej-ĝoŭ kaj Ŝejang aspektas kiel safiroj inkrustitaj sur blua maro. La insuletoj el sputita lafo estas belaj turismaj lokoj kun krutaj deklivoj, profundaj kavernoj kaj densaj arbaroj.

Bejhaj estas nova havenurbo. La ĉina registaro dotis ĝin per pli favoraj kondiĉoj. Escepte de la insuletoj, la tuta urbo estas regiono por ekonomia ekspluato ĝuanta apartajn favorojn. Ĝis oktobro 1985 personoj el pli ol 20 landoj kaj regionoj, kiaj Usono, Britio, Francio, Japanio, FR Germanio, Kanado, Hongkong kaj Aŭmen, venis tien por fari viziton kaj fakan kontrakton. La urbo subskribis 35 interkonsentojn kun

eksterlandaj komercistoj por totala investo de pli ol 23 milionoj da usonaj dolaroj kaj 178 interkonsentojn kun aliaj lokoj de Ĉinio por totala investo de 400 milionoj da ĉinaj jŭanoj. Kun konstruado kaj kompletigado de la haveno, flughaveno, ŝoseo, fervojo kaj komunikiloj, la urbo liveros pli bonajn kondiĉojn al tiuj eksterlandaj komercistoj, kiuj venos tien por fari investon kaj diversajn aferojn.

AMUZO


INTERESAJ DEMANDOJ

1. Ĉu vi povas eldiri sinsekvajn kvin tagojn sen uzi ciferojn?
2. En kia okazo ni diras "10", ekvidinte "2"?
3. Unu demando trovas ĝenerale du malsamajn respondojn. Sed estas tia demando, kiu havas nur unu respondon ĉiam nean. Kia estas la demando?
4. Filo de mia patro ne estas mia frato. Kiu do li estas?
5. Kia horloĝo nur dufoje estas ĝusta en tago kaj nokto?

(Respondoj troveblaj en ĉi numero)

TRANSFORMIĜO

Ĉu vi povas fari tri triangulojn, se vi forprenas nur tri el la alumetoj en la jena aranĝo?



ENIGMOJ

1. Ronda ŝelo, ronda karno, ronda mezo — rondaj interno kaj ekstero.
(Mangajaĵo)
2. Blanka rizo dissemiĝas sur granda blua tuko. Kiam la

suno leviĝas, ĝi tuj malaperas.

(Natura fenomeno)

KIU ESTAS PLI PEZA?

(Humuraĵo)

Mingming: Ĉingĉing, ĉu la matena aŭ vespera suno estas pli peza?

Ĉingĉing: Mi ne scias. Kaj vi? Mingming: Kompreneble la vespera.

Ĉingĉing: Kial?

Mingming: La matena suno estas tiel malpeza, ke unu ondo jam povas ĝin ĵeti en la aeron. Kaj la vespera suno estas tiel peza, ke eĉ granda monto ne povas ĝin subteni.

(Ĉiuj solvoj troveblaj en ĉi numero)

VIN ATENDAS LA HOTELO AMIKECO

de SAŬ BIN



La hotelo Amikeco

Gesamideanoj, LKK de la 71-a UK jam pretigis hotelojn kaj kunvenejon por via ĉeesto al la Pekina UK okazonta en julio. Inter la hoteloj la plej granda en Ĉinio estas la hotelo Amikeco. Vi certe deziras informiĝi pri ĝia detalo, do ni faru rondiron surpagan (Vd. bildon).

Ĝi situas en la okcidenta parto de Pekino. Proksime al ĝi troviĝas la Centra Nacimultiplicita Instituto, Pekina Fremdlingva Instituto, Pekina Politekniko, Ĉina Agronomia Akademio, Ĉina Popola Universitato, Ĉina Akademio de Sciencoj, Pekina Universitato kaj Ĉinghua-universitato. Sude de la

hotelo estas la sporthalo Ĉefurbo, parko Zigujuan kaj Pekina Zoologia Ĝardeno. En la nordo, proksime de la Pekina Universitato, troviĝas la Somera Palaco kaj la ruino de la fama ĝardeno

Juanmingjuan. Pli okcidente de ili lokiĝas la parko Ŝjangŝan kaj la Botanika Ĝardeno. Ĉiujare diverslandaj turistoj ŝatas loĝi en la hotelo eble ĝuste pro ĝia oportuna situo.


Restoracio




La ĉina popolo estas gastama. Antaŭ 2 000 jaroj Konfuceo, granda edukisto de Ĉinio, diris: "Estas ĝojinde, ke amikoj venas de malproksime." Laŭ la ĉina tradicio oni donis al la hotelo la nomon Amikeco. La hotelo estis konstruita en 1954. Ĝi kovras areon de 389 000 kvadrataj metroj, kun plankareo de 200 000 kvadrataj metroj. Ĝi konsistas el belaj konstruaĵaroj kun originala stilo, kvin domegoj dislokitaj en ventumila formo formis ĝian centran parton. Etaĝdomoj kun apartamentoj troviĝas en la kvar anguloj.

La hotelo havas sume 1 590 apartamentojn unuĉambrajn, duĉambrajn kaj triĉambrajn. Ekipaĵoj en la ĉambroj estas praktikaj kaj komfortaj, tamen la luprezo estas malpli alta je 10%-30% ol tiu de luksaj hoteloj. Ĝi havas ses ĉinajn kaj eŭroptipajn restoraciojn, kie preparas pladojn plej lertaj kuiristoj. En la hotelo estas ankaŭ balhalo, tenisejo, sportejo, naĝejo, barbirejo, kosmetikejo, poŝtoŝtanco, fotostudio, vendejo, porkunvena domego kaj simpoziejo.

Nun ni konigu al vi la simpoziejon Pekina Scienca Halo. Tie okazos la 71-a UK. Ĝi havas pli ol 30 diversajn kunvenejojn, kaj



La Pekina Scienca Halo



Skema mapo de la hotelo Amikeco

ankaŭ amuzajn kaj servajn instalaĵojn, kiaj legoĉambro, ŝakludejo, bilardejo, kinejo, librejo, restoracio, lunĉejo kaj tesalono. La halo estas la loko, kie scienlistoj povas fari akademian aktivadon, sin amuzi kaj ripozi. Ke

ni esperantistoj tie vivos kaj kunvenos, tio montras varman subtenon de la ĉinaj sciencaj kaj kulturaj rondoj al la kongreso.


Gesamideanoj, ni bonvenigas vin al la kongreso. Vin atendas la hotelo Amikeco.

Angulo de salono



Vendejo





CHUN-CHAN YEH:

HANS ANDERSEN EN ĈINIO

(Daŭrigo)

Estas kompreneble, ke la vivo kaj la pensado reflektitaj en la verkaĵoj de Hans Andersen ne povas apartiĝi de la epoko, en kiu la aŭtoro vivis. Teorie, estas neeble trovi en la fabeloj kvaliton akordigeblan kun la spirito de la ĉina socialismo. Tamen ĉinaj legantoj kaj kritikistoj malkovras en ili moralajn kaj intelektajn ecojn, kiuj transcendas tempon kaj spacon, kiuj estas universalaj kaj kiuj ankoraŭ kapablas inspiri la ĉinajn gejunulojn, por kulturi en ili temperamenton kaj karakteron taŭgan por la civitanoj de la socialisma lando. En ĉi senco la verko de Hans Andersen ankoraŭ posedas edifan kvaliton por la nuntempaj ĉinaj junuloj.

Ĉi tie la rakonto "Virineto de maro" povas servi kiel ekzemplo. La geherooj, unu princo kaj la alia princino el la profundo de la maro, kiu efektive neniam ekzistas, laŭ klasa vidpunkto, apartenas al aristokratio, al feŭda epoko tute enŝovita en pasintan historion, al la parto de homoj ekspluatanta kaj sekve kondamninda. Ili havas nenion komunan kun la laborantaj homoj de la nuna socialisma Ĉinio. Tamen la ĉinaj legantoj trovas en ili ecojn, kiuj reprezentas la bonajn kvalitojn de la homo, precipe demonstratajn per la princino de la maro. La malfacila travivaĵo kaj la doloroj suferitaj de ŝi meritas nian profundan simpatian, kaj por la bonkoraj, naivaj junaj legantoj, sufiĉas elvoki amarajn larmojn. Sed la ĉinaj kritikistoj atentigas, ke, kio emocias nin, ne estas la netolereblaj suferoj spertitaj de la mara princino, sed la sopiro, kiun ŝi obstine strebas transformi en realaĵon — la sopiro por havigi al si la senmortan animon de homo. La sopiro certe devenas de

ŝia amo por la princo, ĉar nur kun homa animo ŝi kvalifikas ami la princon. Sed ĝuste en tiu punkto la ĉinaj legantoj provizas sian propran interpretadon pri la temo, diference de kutima kompreno. Ke ŝi deziregas ami la princon, tio estas pro la fakto, ke la amata juna aristokrato de reĝfamilio, laŭ la priskribo de Hans Andersen, ekzempligas belon kaj kulturon, kiuj karakterizas la homon. Alivorte la princo reprezentas la homon kun majuskloj, de kategorio de altspecia animalo. De tio oni povas tiri la konkludon, ke ni homoj kun majusklo devas vivi kaj konduti konforme al la titolo — homon kun animo, kiel diferencanta de la malaltspeciaj animaloj inkluzive la familion de la mara virineto, kiu ne havas animon. Ĉi tie la vorto "animo" havas seriozan moralan enhavon. Tial ŝia sopiro por la animo de homo entenas pli profundan signifon ol nur ŝia privata amo. Tra ŝiaj sopiroj kaj strebadoj por akiri homan animon oni povas konkludi, ke oni devas alte valori sian staton de homo kaj la noblan pozicion en la regno de animaloj, kaj ke oni devas konduki sian vivon vere meritante la titolon de homo — homo kun animo. Tiu tezo eltirita el la rakonto ankaŭ havas aktualan signifon por la nuntempa homaro, des pli por la ĉinaj junuloj, kiuj aspiras kaj klopodas en sia konstruado de socialismo por krei belan estontecon. Kiel animalo en maro, animalo de malalta specio, la mara virineto ne povas esti homo, des malpli akiri homan animon. Ŝia amo por la princo logike rezultiĝas en tragedio. Ŝi ja havas la ŝancon por ŝanĝi sian kondamnitan sorton kaj ricevi sian originalan formon kiel princineto de la maro, laŭ la admono de sia avino kaj fratinoj, por ke ŝi daŭre vivu feliĉe en la maro, se ŝi mor-

tigas la princon en la nokto de lia edziĝo, por ke lia varma sango ŝprucu sur ŝiaj piedoj. Tamen ŝi sin detenas tion fari. Kontraŭe ŝi sin ĵetas en la maron transformante sin en ŝaŭmojn. Sin oferi por la feliĉo de alia homo, precipe homo kiun oni amas, estas la spirito rigardata kiel nobla, spirito kiun oni alte valoras kaj penas kulturi inter gejunuloj en la nuntempa socialisma Ĉinio.

Tiu ĉi ekzemplo ilustras, ke la "eventyr" de Hans Andersen inspiras la hodiaŭajn legantojn de Ĉinio en ilia klopodo atingi la celon esti nobla kaj bona kiel socialisma homa estaĵo. Kaj la spirito de demokratio, la deziro por socia progreso kaj la omaĝo al homoj, kiuj multe kontribuas al la antaŭeniĝo de civilizacio, al mondpaco kaj interkompreniĝo kaj amikeco de diversaj popoloj, abunde esprimataj en la fabeloj, ankaŭ kuraĝigas la ĉinojn en la klopodo por konstrui feliĉan vivon. Kaj dank' al tio la ĉinoj sin sentas tre intimaj al la dana verkisto kaj rigardas lin kiel bonvoleman amikon, kvankam li vivis antaŭ tiel longa tempo kaj en tia malproksima lando.

Ĉinio nun okupiĝas pri granda tasko, la tasko transformi la landon en modernan ŝtaton, ne nur industrie, sed ankaŭ kulture, morale kaj en aliaj kampoj. Ĝi bezonas grandan nombron da specialistoj, fakuloj kaj klerigitaj homoj por realigi la taskon. Tial multe da junuloj penas surgrimpi la pinton de scioj, de sciencaj esploroj, por ke ili povu kontribui al progreso de la lando kaj ankaŭ de la mondo. Tamen la vojo ne ĉiam estas glata. Necesas persista pacienco kaj eĉ lukto. En tio la ĉinaj junuloj trovas kuraĝigan mesaĝon en la ofte ignorita fabelo "Dorna vojo de la honoro". Hans Andersen atentigas al siaj legantoj, ke dornoj abundas sur la vojo al grandaj taskoj, tamen ili povas esti forigitaj de homoj kun celplena volo kaj persistemo. La fabelo fariĝas tiel konata en Ĉinio, ke la populara gazeto "Junula Kompendio" reprenis ĝin, kaj ĝi estis vaste legata tra la lando, kaj fariĝas temo de diskutado inter gejunuloj.

La fakto, ke Hans Andersen estas tiel favore akceptita en Ĉinio, do ne signifas, ke ĉinoj interpretas lin de vidpunkto de utiliĝo. Oni legas lian verkon unue kiel literaturaĵon kaj poezion, en kiu oni spertas grandan plezuron. Kaj nur kiel tiaj liaj fabeloj influas la ĉinajn legantojn. Aparte de tio, lia naiveco, modesteco, meditema filozofio kaj, antaŭ ĉio la ĉarmo de arto, allogas la ĉinojn, kiuj krome trovas, ke tiuj kvalitoj akordiĝas kun ilia temperamento kaj sekve tuŝas iliajn korojn.

Eble ankaŭ pro la fakto, ke Ĉinio, kiel disvolviĝanta lando, havas ankoraŭ freŝan memoron de la malgaja, malnova socio de la proksima pasinteco, de la vivo de la epoko en kiu Hans Andersen vivis kaj pri kiu li priskribis, kaj la sento kiun li reflektis en siaj malfruaj fabeloj, impresas la ĉinojn kiel intimaj memoraĵoj de ilia propra vivo-sperto. Rakontoj kiel "Knabineto kun alumetoj", "Sub la Saliko" kaj "Ŝi estas tute sentaŭga", vere tuŝas la korojn de ĉinaj legantoj. En ilia memoro la travivaĵo de la povra knabineto kun alumetoj povas esti okazintaĵo en la hieraŭa Ĉinio. Ŝia tragedia morto incitas fortan emocian reagon ĉe junaj ĉinaj legantoj kaj ŝi fariĝas konata preskaŭ en ĉiu ĉina familio. La rakonto estis filmigita de la Centra Televido de Ĉinio kaj montrata tra la tuta lando. Ĝi ankaŭ estis surscenigita en la ĉefurbo kiel baletado de la Ĉina Baletado-Instituto. Antaŭ mia vojaĝo al Eŭropo por ĉi kongreso mi vizitis urbeton en la suda provinco Hunan, kie mi ĉeestis vesperkunvenon de geknaboj el elementaj lernejoj. Iu malgranda knabino prezentis la rakonton ludante la rolon kun alumetoj. Ĉe la fino ŝi faris jenan paroladeton:

"La tragedio kia tiu de la knabineto kun alumetoj ofte okazis dum la ne longe pasinta tempo ankaŭ en nia lando. Mia avo ofte rakontis tion al mi. Ni nun estas feliĉaj, ke tia afero ne plu okazas ĉe ni. Tamen ni ne devas forgesi la sorton de la knabineto kun alumetoj. Ĝi devas esti memorigilo por ni en nia studo kaj morala pliboniĝo, por ke ni povu esti utilaj civitanoj de nia lando, por ke la sama tragedio neniam ripetigu."

Tiamaniere la fabeloj de Hans Andersen sin ligas intime kun la vivo, penso kaj sopiro de ĉinaj gejunuloj kaj radikiĝas en ĉina grundo. Ankaŭ mezaĝaj kaj oldaj homoj trovas materialon en la fabeloj por primediti, remaĉi kaj sammaniere reflekti la vivon kaj ricevas edifon en la proceso. Tia materialo ofte sin esprimas en du aŭ tri frazoj kiel eroj de pensaĵoj, kiuj akre impresas la menson kaj restas neforgeseblaj tie. Ili reprezentas observadon kaj konon pri la vivo. Cetere ili nin helpas pli profunde kompreni la fabeliston kaj la landon, en kiu li naskiĝis kaj vivis. Tiaj aforismecaj frazoj sin trovas abunde, preskaŭ kie ajn en la tekstoj de la fabeloj. Ekzemple, en la rakonto "Fajrilo" oni facile renkontas frazojn, kiuj brilas kun saĝeco kaj kiuj incitas nian reflektadon pri vivo. La protagonisto, t.e. la soldato, kiam li havis monon, vivis lukse, kun multaj vizitantoj

ĉiutage salutantaj lin. Sed "fine restis al li nur dek speso; kaj el la belegaj ĉambroj, en kiuj li antaŭe loĝis, li devis transloĝiĝi tre alten, en malgrandan frontonan ĉambreton tute sub la tegmento. Li devis mem brosi al si siajn botojn kaj flikadi ilin per flikkudrilo, kaj neniu el liaj amikoj venadis al li, ĉar oni devis leviĝi al li per tro multe da ŝtuparoj." La lasta frazo ridigas nin, sed amare.

Eĉ en la kortuŝa rakonto "Knabineto kun alumetoj" Hans Andersen provokas nian pensadon kun akra ironio, kiam li priskribas pri la pantofloj, kiujn la knabineto havas sur siaj nudaj piedoj: "Sed tio estis tre grandaj pantofloj, ili antaŭe estis uzataj de ŝia patrino, tiel grandaj ili estis, kaj ilin la knabineto perdis, kiam ŝi rapidis transkuri la straton, kiam du kaleŝoj kun furioza rapideco pretergalopis; unu pantoflon oni plu ne povis trovi, kaj kun la alia forkuris iu knabo, kiu promesis, ke li uzos ĝin kiel lulilon, kiam li iam havos infanojn." Simile en la rakonteto "Gefianĉoj" la turbo fanfaronas al sia "fianĉino" la pilko pri sia nobla nasko, kondukante kun ŝi jenan dialogon:

"Jes, sed mi estas el mahagona ligno!" diris la turbo, "kaj la urbestro mem min tornis, li posedas propran tornotablon, kaj tio kaŭzis al li multe da plezuro."

"Ĉu mi povas tion fidi?" demandis la pilko.

"Neniam mi ricevu frapon de vipo, se mi mensogas!" asertis la turbo, ĉar por la turbo esti vipita estas granda honoro. La privilegio devenas de la nobla nasko! Tia senco de humoro kaj memmoko havas grandan afinecon kun la humoro de ĉinoj, kiuj ŝatas tian akran tamen varman kritikon de nia vivo, en sama maniero kiel ili aprecas siajn proprajn absurdaĵojn kaj ridindaĵojn — fakte tio estas speco de memkritiko bedaŭrinda sed ne korŝira.

En la biografeca rakonto "Feliĉa Peer", kiun Hans Andersen verkis en 1870, kvin jarojn antaŭ sia morto, la aŭtoro konkludis pri la morto de la protagonisto kun jenaj vortoj: "Kiel Sofoklo ĉe la olimpikaj ludoj, kiel Thorvaldsen ĉe la simfonio de Beethoven en teatro, li mortis en venĝo. Unu vejno krevis en la koro, kaj liaj tagoj finiĝis kiel fulmo, finiĝis sen doloro, finiĝis en mondjubilado, finiĝis kun plenumiĝo de sia mondmisio. La feliĉo super milionoj da homoj!" Kvan-kam ĉinoj havas sian propran filozofion de vivo,

tamen ilia kompreno de feliĉo, la feliĉo rekonita dum la lasta momento de la vivo, estas pli-malpli simila al tiu de Andersen. Kiam oni finplenumas taskon postulata de la vivo kaj proksimiĝas al sia lasta spiro, oni sentas sin feliĉa. La vortoj por la sento en la ĉina lingvo estas "komforta ripozo", kiu esprimo egalas al la sento de feliĉo de Peer. Kun tia sinteno al morto oni povas havi grandan kuraĝon dum vivo por paŝi antaŭen al plenumado de la tasko, kiun oni devas plenumi dum sia vivo, kaj por venki, kun aplombo kaj certigo, kian ajn obstaklon aŭ dornon sur la vojo de la tasko. Tio eksplikas, kial unu el miaj ĉinaj amikoj, kiu estas konata sciencisto, ĉiumatene, dum matenmanĝo, kutime legas unu rakonton de Hans Andersen, por esti spirite preparita por la laboro de la tago kaj eventualaj malfacilaĵoj, kiujn li povus renkonti dum la laborado. Li tiras de la fabelo inspiron kaj memkonfidon. Kaj la inspiron kaj memkonfidon bezonas ĉiu ĉino hodiaŭ en sia taga laboro por transformi la landon en modernan ŝtaton.

Tial ne estas hazarde, ke Hans Andersen fariĝas en Ĉinio unu el la plej favoritaj verkistoj el la Okcidento. Liaj fabeloj, kiel ĉiuj belaj kaj rafinitaj verkaĵoj literaturaj de antikva kaj moderna tempo, formas integran parton de la kultura nutraĵo de la ĉina popolo. Ili jam alkiŝiĝas al la medio de la lando, kaj sekve ankaŭ fariĝas parto de la ĉina literaturo. Por la ĉinaj verkistoj de infanliteraturo la influo, kiun Hans Andersen ekzercas, estas impresa, samkiel tiu de aliaj majstroj de literaturo en la literatura kampo por plenaĝuloj dum la literatura revolucio, kiun mi jam menciis je la komenco de tiu ĉi prelego. Tio ankaŭ pravigas la aserton, ke ĉiuj atingoj en homaj scioj, inkluzive literaturon kaj arton, estas komuna riĉaĵo de la homaro de la tuta mondo. Oni devas respekti kaj adapti ilin por la bono kaj progreso de sia popolo. Estas kun tia konvinko, ke la ĉina popolo rigardas kaj asimilas la kulturajn kaj sciencajn atingojn de aliaj popoloj.

Vere, estis tempo en la ĉina historio, kiel la tempo de tiel nomata kultura revolucio, kiam la aŭtoritatuloj fernis la pordon de la lando kaj rifuzis kulturen interŝanĝon kun fremdaj popoloj. Sed en la longa fluo de historia rivero, tio estas nur momento. La popolo ĉiam kapablas korekti la eraron ĝustatempe. Jen ĝuste kio okazas hodiaŭ en Ĉinio. Kaj estas tute juste, ke Hans Andersen ree ĝuas grandan popularecon en la lando, kion li meritas.

SPORTO KAJ ESPERANTO

Kun granda intereso mi legis en via interesa revuo la artikolon "Marŝu al la Olimpikoj" skribitan de la prezidanto de la Tut-Ĉinia Sporta Federacio kaj la Ĉina Olimpika Komitato.

Varme mi aprobas la deziron de la aŭtoro klare esprimitan per la lastaj vortoj de tia artikolo, aperinta antaŭ la disvolviĝo de la 23-a Somera Olimpiko en Los-Anĝeleso: li esperas, "ke la ĉinaj sportistoj faros kontribuon por plifortigi la amikecon inter la ĉinaj kaj diverslandaj sportistoj kaj propagandi la idealon de la Olimpikoj." Fakte unu el la celoj de la Olimpikoj estas plifortigi la amikecon inter diverslandaj sportistoj.

Tiuj ĉi konkuras batalante unu kontraŭ alia, ĉiu por sia teamo aŭ por la flago de sia lando, sed, kiel homoj, ili sentas amikecajn kaj fratecajn sentojn por siaj konkurantoj aŭ kontraŭuloj: malofte, bedaŭrinde, ili sukcesas reciproke esprimi tiujn ĉi sentojn pro la malfacilaĵoj kaŭzitaĵoj de la malsameco de la parolataj naciaj lingvoj.

Pluraj olimpikuloj aŭ mond-ĉampionoj, intervjuitaĵoj, konfirmisian deziron konversacii kaj ami-

kiĝi dum la Olimpikoj aŭ la internaciaj konkursoj kun sportkamaradoj parolantaj aliajn naciajn lingvojn nekonatajn, sed plendis pro la malfacilaĵoj kaj bariloj al la interkompreniĝo.

La plifortigo de la amikeco inter la sportistoj estos faciligita aŭ efektive ebla nur kiam ili sukcesos senpere interkompreniĝi, kiam ili rekte interŝanĝos siajn pensojn sen la helpo de tradukantoj aŭ interpretistoj.

Kutime oni klopodas solvi la problemon en la sporta medio uzante ian nacian lingvon, ĝenerale la anglan aŭ la francan, la du oficialajn lingvojn de la Internacia Olimpika Komitato. Sed tio ĉi estas nur empiria kaj arida sistemo, ĉar pere de tiuj du lingvoj la sportistoj ne sukcesas atingi. . . "ĉiujn orelojn". Plurfoje ili, anstataŭ paroli kun sportkamaradoj, gestas mane aŭ piede, kiel mi (kiel internacia sporta kronometristo) kelkfoje konstatis: tio ne estas konversacio!

Male, se ili uzus ian komunan internacian neŭtralan lingvon kiel, ekzemple, Esperanto, ili sukcesus libere esprimi siajn ideojn kaj sentojn, plifortigante la reciprokajn kunnaskitan amikecon.

Por atingi tiun celon estos tre utile se, eksperimente, dum la venontaj Olimpikoj okazantaj en Seulo en 1988 grupo da atletoj el kvar aŭ kvin landoj (prefere en diversaj kontinentoj), kie la Esperanta movado estas sufiĉe forta (ekzemple Ĉinio, Usono, Hungario, Aŭstralio, Brazilo), lernos antaŭe Esperanton helpataj de siaj landaj asocioj: ili povus pruvi dum la venontaj Ludoj la utilecon kaj taŭgecon de nia internacia lingvo; krome ili povus montri al siaj kamaradoj kiel facile ili amikiĝas konversaciante kaj interkompreniĝante rekte kun aliaj sportistoj, dank' al Esperanto.

La 1986-a Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Pekino povus esti favora evento por la pretigo de konkreta taŭga plano, per kiu oni efektivigos tian proponon.

** La aŭtoro estas komisiito pri sporto de la Universala Esperanto-Asocio, oficiala sporta kronometristo kaj membro de la Internacia Federacio de Sportaj kronometristoj.*

KURANTAJ AFEROJ


POKAPA MEZNOMBRA GRENA KVANTO DE ĈINIO PROKSIMIĜIS AL TIU DE LA MONDO

La pokapa meznombra grena kvanto de ĉinoj estas ĉ. 400 kg. kiu proksimiĝis al tiu de la mondo. Kaj tiel Ĉinio fundamente solvis la problemon de nutraĵoj por miliardo da loĝantoj. Tion diris la ĉina ĉefministro Ĝaŭ Zijang en sia skriba parolo okaze de la 40-jara datreveno de la fondiĝo de la Nutraĵa kaj Agrikultura Organizo de UN en la pasinta oktobro. Sed pro la malekvilibro de la ekonomia disvolviĝo la kamparanoj en kelkaj regionoj vivas ankoraŭ malfacile, la problemo pri grenoj ankoraŭ estas grava problemo solvenda por Ĉinio en la estonteco.

ĈINAJ RAKETOJ ENIRIS EN LA INTERNACIAN MERKATON

Oktobre de la pasinta jaro la ĉina registaro decidis irigi la raketojn "Ĉangĝeng — 2" kaj

Riĉa rikolto



"Ĉangĝeng — 3" projektitajn kaj faritajn de Ĉinio en la internacian merkaton, por lanĉi sateliton laŭ postuloj de klientoj eksterlandaj. Samtempe, la Ĉina Popola Asekura Kompanio volas doni sian servon al klientoj kontraŭ favoraj prezoj de la internacia merkato.

La raketo "Ĉangĝeng — 2" estis sukcese elfarita de Ĉinio en la mezo de la sepdekaj jaroj, ĝi estas duŝtupa ŝarĝraketo kun likva karburajo, kiu povas sendi sateliton pezan je du tunoj en perigeon laŭ postuloj. Ĝiaj tekniko kaj preciza surorbitiĝo estas fidindaj. La raketo "Ĉangĝeng — 3" jam sukcese sendis la unuan ĉinan eksperimentan komunikan sateliton en sinkronan orbiton.

LA PLEJ LONGA FERVOJA PONTO DE ĈINIO FINKONSTRUITA

La plej longa fervoja ponto de Ĉinio, Ĉangdong-pontego super la Flava Rivero, estis finkonstruita la 31-an de la pasinta oktobro.

La ponto 10.282 km. longa kun 296 pilieroj situas sur la nova linio de la Ŝinŝjang-Heze-a Fervojo. Ĝi estas la plej longa fervoja ponto en Azio. Ĝi ludos gravan rolon en la ekonomia disvolviĝo de orienta Ĉinio.

ĜAŬLONG-HOTELO FUNKCIIGATA

Ĝaŭlong-hotelo, la unua hotelo administrata de la Ĉina Ŝtata Turisma Buroo, estis finkonstruita kaj komencis akcepti gastojn en aŭtuno de la pasinta jaro.

La hotelo estis projektita, konstruita kaj administrata de ĉinoj. La konstruado ricevis financon helpon de Baŭ Jugang, prezidanto de la Hongkonga Universala Navigacia Grupo, kaj la hotelo estas nomita per la nomo de lia patro.

Ĝaŭlong-hotelo situas en la kvietita kvartalo de ambasadorejoj. Ĝi konsistas el triangula ĉefdomo

alta je 73 m. kaj akcesoraj konstruaĵoj kun malsama alteco. La hotelo havas 270 perfekte ekipitajn luksajn ĉambrojn.

INAŬGURO DE LA DOMO REGENT

La plej granda altklasa restoracio kaj sinteza servocentro de Henan-provinco — la domo Regent oficiale inaŭguriĝis je la 8-a de novembro, 1985, en Ĝengĝoŭ. La domo estas investita kaj administrata de Henan-provinco kaj Komerca Kompanio Limigita Fullion.

La domo estas kvar-etaĝa kun totala konstrua areo de 4 100 kvadrataj metroj. Ĝi en originala stilo kaj belaspekto havas formon de renversita pagodo. La unuan etaĝon okupas butikoj, itala kafejo kaj aliaj servoj, kiaj kolora komputil-regata fotado, seka lavado de vestoj, elektronikaj ludiloj. Sur la dua etaĝo estas ĉina restoracio kun antikva stilo, kie vendiĝas ĉefe famaj pladoj kun Ĝuangdong-a kaj Henan-a gustoj. Sur la tria etaĝo sin trovas Napoleona Restoracio, gracia kaj komforta, kiu liveras francajn kaj aliajn eŭropajn pladojn. Krome, sur tiu etaĝo estas ankaŭ franca, angla, japana, hispana haloj specialaj por luksaj bankedoj. La Kristala Halo

Ĝaŭlong-hotelo



sur la kvara etaĝo estas diskodancejo ekipita per modernaj lumaj kaj sonaj aparatoj. Tie oni povas okazigi ankaŭ bankedon, kunvenon aŭ ekspozicion.

La domo ludos per unuaklasa servo sian rolon en la turisma afero de Henan-provinco.

FONDITA INVENTO-ASOCIO EN ĈINIO

La Ĉina Invento-Asocio fondiĝis la 16-an de oktobro, 1985. Subteni kaj kuraĝigi inventadon estas baza politiko de Ĉinio. La fondiĝo de la asocio havas gravan kaj profundan signifon en la historio de la scienca kaj teknika disvolviĝo de Ĉinio. Post sia establo la asocio aktive kunlaboras kun la scienc-teknikaj administraj departementoj de diversnivelaĵoj registaroj en organizado, propagando kaj stimulado de inventaj aktivadoj de la popolamasoj, kaj akcelos la inventajn aktivadojn en Ĉinio.

FONDIĜO DE LA AGENTEJO DE LA MONDA BANKO EN ĈINIO

La Agentejo de la Monda Banko en Ĉinio fondiĝis la 25-an de oktobro de la pasinta jaro, en Pekino. De post kiam Ĉinio reakiris la laŭleĝan sidlokon en la Monda Banko, 1980, la rilatoj inter la banko kaj Ĉinio pli kaj pli boniĝis kaj ĝi provizis Ĉinion per pli ol 3 miliardoj da usonaj dolaroj por disvolvi la edukon, higienon, agrikulturon, forston, trafikon, industriojn kaj aliajn aferojn de Ĉinio.

ĈINIO GAJNIS TEAMAN SUBĈAMPIONECON EN LA MONDA GIMNASTIKA ĈAMPIONECA KONKURSO

En la 23-a Monda Gimnastika Ĉampionececa Konkurso en Montreal de Kanado la ĉina vira teamo gajnis la subĉampionecon kun totalaj poentoj de 582.60, post streĉa lukto. La ĉina sportisto Tong Fej per siaj graciaj kaj animskujaj movoj en rekado gajnis 10

poentojn, la plej altajn en la vira teama konkurso. La ĉampionecon gajnis la sovetia teamo kaj la trian lokon — la teamo de DR Germanio.

ĈEN JU GAJNIS LA UNUAN LOKON EN LA KANTA KONKURSO DE TOULOUSE

25-jara ĉina baritonulo Ĉen Ju gajnis la unuan lokon de vira grupo en la Internacia Kanta Konkurso de Toulouse, Francio, en la lasta oktobro. La ĉina mezosopranulo Mjaŭ Ĉing la trian lokon de virina grupo.

El la 71 konkursanoj venintaj de ĉ. 30 landoj 12 gekantistoj partoprenis en la finalo.

ĈINAJ VIRINAJ VESTOJ EN LA PARIZA FOIRO DE VIRINAJ VESTOJ

Oktobre de la pasinta jaro, en la 50-a Pariza Internacia Foiro de Virinaj Vestoj Ĉinio eksponis 94 kompletojn da vestoj el 6 kategorioj, kiaj ĉina robo, ceremonia vesto, ŝelkorobo. La ĉinaj vestoj estas delikate faritaj, kun fortajnaciaj trajtoj. Ili vekis vastan atenton de vizitantoj.

Multaj komercistoj kaj vestoprojektistoj iniciative traktis kun la ĉinoj pri kunlaboro kaj interŝanĝis kun ili spertojn de vestofarado.

En la foiro Ĉinio subskribis kun alilandaj klientoj kontraktojn kaj interkonsentojn por eksporto, eksponado kaj podetala vendado de 33 specoj de vestoj.

USONA DANCTEATRO DE ALVIN AILEY EN ĈINIO

Invitite de la Ĉina Prezertara Agentejo, la Usona Dancteatro de Alvin Ailey turneis en Pekino, Nanĉang kaj Ŝanhajo, en la lastaj oktobro kaj novembro.

La teatro estas unu el la plej eminentaj danctropoj de modernaj dancoj en Usono. Post sia fon-

diĝo en 1958 ĝi vizitis 44 landojn de la kvin kontinentoj kaj 48 ŝtatojn de Usono, plurfoje partoprenis en internaciaj festivaloj kaj gajnis premiojn.

Ĝi estas negra danctropo en originala stilo. S-ro Alvin Ailey, arta direktoro, kunfandis la dancojn de afrik-karibaj negroj, modernajn dancojn, ĵazdancojn kaj baletojn, kaj tiel kreis originalajn dancojn.

La teatro prezentis "Nokta Estaĵo" kaj aliajn kvar dancojn, kio gajnis aplaŭdon de ĉinaj spektatoroj.

HUNGARA PIANISTINO ANNIE FISCHER EN ĈINIO

Annie Fischer, fama hungara pianistino, turneis en Pekino, Ŝanhajo kaj Gulin, en la unua tagdeko de la lasta novembro.

La pli-ol-sepdek-jara Annie Fischer estas prestiĝa pianistino en la monda muzikista rondo. De sia dekdu-jara aĝo ŝi jam okazigis pianan koncerton en-kaj eksterlande. En dekoj da jaroj ŝi vizitis preskaŭ ĉiujn lokojn de la mondo.

En la koncerto okazigita en Pekino ŝi prezentis pianajn verkojn de R. Schumann, Betoveno kaj Ŝopeno kaj ricevis varman aplaŭdon.

Hungara pianistino Annie Fischer en la Somera Palaco de Pekino





Danco prezentata de la Usona Danc-teatro de Alvin Ailey en Ĉinio

FOTOEKSPOZICIO DE NORVEGIO EN PEKINO

Aŭtune de 1985 okazis en la Kultura Palaco de Laboruloj en Pekino fotoekspozicio kun cent koloraj fotoj de Norvegio.

La fotoj kiel ĉarmaj pentraĵoj prezentis belajn pejzaĝojn de Norvegio, lando de la norda Eŭropo, kaj la vivon kaj morojn de la tieaj loĝantoj. La ekspozicio

allogis al si multajn ĉinajn fotoamatorojn.

EKSPOZICIOJ DE GERMANAJ PENTRAĴOJ DE LA 19-A JARCENTO EN PEKINO

Laŭ kontrakto pri kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj FR Germanio kaj tiu inter Ĉinio kaj DR Germanio la ekspozicioj de germanaj pentraĵoj de la 19-a jarcento


de la du landoj okazis sinsekve en Pekino, oktobre, 1985.

La ekspozicio de FR Germanio okazis en la Ĉina Belarta Domo. Estis eksponitaj sume pli ol 60 verkoj de pli ol tridek pentristoj. La verkoj de Spitzweg, Waldmüller, Kersting, Schinkel, Marees kaj aliaj famaj pentristoj donis profundan impreson al la vizitantoj.

La ekspozicio de DR Germanio unue okazis en Ŝanhajo septembre kaj poste en la Ĉina Historia Muzeo de Pekino. Oni eksponis 74 verkojn de 66 pentristoj. La ekspozicio konigis al ĉinoj teknikojn kaj stilojn de la pli ol dek skoloj de la 19-a jc. kiaj tiuj de J.H.W. Tischbein, la reprezentanto de klasikismo, kaj de C.D. Friedrich, la reprezentanto de frua pejzaĝa romantikismo.

Ambaŭ ekspozicioj plaĉis al la ĉinaj belartistoj kaj belartamatoroj kaj estis alte taksitaj de ili.

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. Senĵang
3. Bejhaj
4. Tibeto
5. Gengĝoŭ
6. Sumeru-monto
7. Tajĵŭan
8. Ĉĵuangŝoŭ
9. Ĝaŭŝjan-gubernio
10. Ĝuanŝjan-gubernio
11. Luding-gubernio
12. Ŝinŝjang-gubernio
13. Heze-gubernio
14. Kunming

**LA HENAN-A E-ASOCIO
FONDITA**

De la 28-a ĝis la 29-a de septembro, 1985 la Henan-a E-Asocio okazigis sian fondkunvenon en Ĝengĝoŭ post unujara preparado. La kunvenon ĉeestis pli ol 120 reprezentantoj kaj esperantistoj el diversaj lokoj de la provinco.

Respondeculoj de la provincaj Konstanta Komitato de la Popola Kongreso, Federacio de la Sociaj Sciencoj, Scienc-teknika Asocio kaj Oficejo de Eksteraj Aferoj persone partoprenis en la kunveno kaj gratulis ĝian fondiĝon. Ili unu-anime certigis la rolon de Esperanto en la internacia komunikado kaj esprimis sian subtenon al propagando de Esperanto.

La kunveno ricevis gratulajn leterojn kaj telegramojn el pli ol 20 provincaj kaj urbaj E-asocioj. Ĝi decidis inviti U Ŝaŭkuj kiel honoran prezidanton, Liŭ Ĉuntang kaj Ŭej Ĝangbaŭ kiel ĉefkonsilantojn de la asocio kaj elektis Ĝang Heng, Zoŭ Hehuj, Ĝang Haŭgŭang, Bjan Ĝijing kaj Ĝang Ŭenŝjang kiel prezidanton kaj vicprezidantojn de la asocio respektive.

Iom pli frue, en la 7-a de la sama monato fondiĝis la Junula E-Asocio de Ĝengĝoŭ. Nun dek urboj de Henan-provinco havas siajn E-organizaĵojn, kaj en la provinco pli ol 5 000 lernas nian lingvon.

S-RO I. BENGTTSSON TELEGRAFIS AL ĈEL


La 27-an de oktobro, 1985, s-ro Ingemund Bengtsson, prezidanto de

la sveda parlamento, kiel gasto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso telegrafis de Nankino al la Ĉina Esperanto-Ligo: "Ingemund Bengtsson, prezidanto de la sveda parlamento, salutas dum restado en Ĉinio la Ĉinan Esperanto-Ligon kaj la redakcion de El Popola Ĉinio, dankas pro la regula sendado de la revuo kaj deziras al ĝiaj laborantoj ankaŭ pli grandajn sukcesojn en ilia grava laboro."

LA 58-A KONGRESO DE SAT

La 58-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazis de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto, 1985 en Amersfoort, Nederlando. Ĝia ĉeftemo estis "Laboro — ĉu puno aŭ beno?", kiu reliefigas la gravan problemon, kiun ĉiutage alfrontas la tuta homaro. Ĝin ĉeestis 225 gekamaradoj el 15

Esperanto-kurso gvidata de s-ro David G. Valecillos V. en la sidejo de "Gran Fraternidad Universal" (asocio pri vegetarismo kaj similaj aferoj), Venezuelo



landoj, ĉefe eŭropaj, sed ankaŭ kelkaj el Usono, Japanio k.a. La solenan malfermon ĉeestis delegacio de UEA, s-anino Flora Szabo-Felso, ĝenerala sekretario de UEA, kaj s-ano Gregoire Maertens, prezidanto de UEA, amike salutis la kongreson, substrekante la gravan rolon de SAT en nia Esperanto-Movado. Nome de la Ĉina Esperanto-Ligo salutis la kongreson s-ano Zhang Qicheng, ĝia ĝenerala sekretario.

La 59-a SAT-Kongreso okazos en Sant Cugat del Valles (Barcelono) en Hispanio, de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto, 1986.

FUNKCIULO DE UN RICEVIS LA UNUAN PREMION ZAMENHOF

S-ro Robert Muller, asista ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, estas bone konata kiel aŭtoro, pensulo kaj apoganto de internaciaj kunlaboro kaj kompreniĝo. Li estas ankaŭ subtenanto de Esperanto kaj faris inaŭguran paroladon en la 64-a Universala Kongreso de Esperanto en Lucerno en 1979. Oni formale prezentis al li la premion Zamenhof en Novjorko la 13-an de decembro, 1985 laŭ lastatempa anonco de la elektokomitato por tiu premio.

INFORMOJ PRI TEJO

1. Depost la 41-a IJK en Eringerfeld pasporta servo de TEJO havas novan centran respondeculon. La pasportan servon por 1986 kompilas komputilo Bertil Wennergren, Sagargatan 18, S-11636 Stockholm, Svedio.

2. TEJO kaj PSEK (Pola Studenta Esperanto-Komitato) invitas ĉiujn aktivajn junajn esperantistojn al la 4-a TEJO-PSEK-Seminario por Esperanto-aktivuloj, kiu okazos de la 20-a ĝis la 27-a de marto, 1986 en Pollando. La celo de la seminario estas detale trakti la celojn, stelon kaj perspektivojn de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO; la alia celo estas progresigi la agadon de la Komisiono pri Aktivula Trejnado de TEJO.

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

La Kultura Centro Esperantista (KCE) estas internacie frekventata Esperantujo. Ĝiaj sep domoj si-

turan semajnon, en kiu enskribiĝis 23 esperantistoj el 8 brazilaj

landoj. La semajno konsistis el rondo de prelegoj kaj 21-hora kurso pri "La Arto Traduki en/el

Surtabula ekzercado en la Kurso pri Tradukado de la Kultura Semajno de Esperanto-Asocio de Brazilia



tuas en la montaro flanke de la urbo la Chaux-de-Fonds en Svislando. KCE proponas diversajn

interesajn programerojn por ĉiu tago de la jaro. Elektu vian ferio-periodon por kultura kaj lingva riĉiĝo ĉe KCE, el multaj ebloj de la unua duonjaro de 1986. Petu la detalajn informilojn de KCE, Pf. 771 CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

KULTURA SEMAJNO EN BRAZILIO

De la 22-a ĝis la 28-a de julio, 1985 la Esperanto-Asocio de Brazilo (Caixa Fostal 11-1124, 70084 Brasilia DF, Brazilo) okazigis kul-

Esperanto(n)", gvidata de Leopoldo H. Knoedt. Dum la semajno la ĵurnaloj aperigis notojn pri la evento kaj la Brazilia Supera Radio FM elsendis en 3 tagoj intervjurojn de la kursgvidanto kaj EAB-membro.

Ŝenjang — la frua ĉefurbo de Ĉing-dinastio

de CAJ HAJFENG

El la palacaj konstruaĵaroj nun ekzistantaj en Ĉinio, la imperiestra palaco de Ŝenjang estas la dua granda palaco post la imperiestra palaco en Pekino laŭ ilia historia kaj arkitektura valoro.

Ŝenjang estas la ĉefurbo de Ljaŭning-provinco kaj fama industria urbo de Ĉinio. Se oni veturas de Pekino nordorienten per aviadilo, ili povas atingi Ŝenjang post malpli ol 2 horoj. Ĝi estas trapasenda loko por vojaĝantoj per trajno al la provincoj Ĝjilin kaj Hejlongĝjang de la landinterno.

La urbo havas historion de pli ol du mil jaroj. En 1616 Nuerhaĉi, gvidanto de Njuĝen-nacieco (antaŭulo de manĉur-nacieco), fondis la regpotencon Posta Ĝin (alinomita Ĉing en 1636) kaj en 1625 prenis tiun lokon kiel sian ĉefurbon. En 1644 Ĉing-dinastio translokis sian ĉefurbon al Pekino. Tial tie restis multaj historiaj objektoj de la fruperioda Ĉing-dinastio, kiaj la malnova imperiestra palaco, unuaj imperiestraj maŭzoleoj Fuling kaj Ĝaŭling de Ĉing-dinastio.

La palaco de Ŝenjang estis loĝejo de imperiestroj Nuerhaĉi kaj lia filo Hŭangtajĝi. Ĝia konstruado komenciĝis en 1625 kaj finiĝis en 1782. Ĝi havas evidentan stilon de manĉura arkitekturo kaj estas ankaŭ brila kombiniĝo de la hana kaj manĉura kulturo.

Ĝi situas en la centro de la malnova urbo Ŝenjang kaj okupas areon de pli ol 50 000 kvadrataj metroj. La palaco majesta kaj

pompa havas multajn halojn kaj pavilonojn. Ĝiaj dekelkaj kortoj povas dividiĝi en partojn orientan, mezan kaj okcidentan.

Apenaŭ enirinte la orientan pordon, oni povas vidi la halon Daĝeng, situantan en la mezo. Ĝi estis loko, kie imperiestroj okazigis gravan ceremonion. La halo estas okangula kun duobla kornico, staranta sur bazamento kun gravurita balustrado bluŝtona. Antaŭ ĝi estas longa vojo, ĉe kies ambaŭ flankoj viciĝas po kvin kvadrataj kioskoj nomitaj per dek princoj. Ili estis la oficejoj de la maldekstra kaj dekstra princoj kaj ĉefoj de la ok flagoj. Ĉing-dinastio praktikis ok-flagan reĝimon kombinantan armeon kaj politikon. La ok flagoj kun okmalsamaj koloroj reprezentis po unu arma-politikan unuon. Tia konstrua dispozicio laŭ la manĉura okflaga reĝimo diferencis de la aliaj ĉinaj palacaj konstruaĵoj.

Ĝia mezparta dispozicio estis pli kompleta. Sur la mezaksa linio viciĝas unu post alia la pordego Daĉing, halo Congĝeng, Feniksa Domo, halo Ĉingning ktp. La ĉefa halo Congĝeng estis loko, kie la imperiestro Hŭangtajĝi traktis militajn kaj politikajn aferojn, akceptis alilandajn delegitojn kaj naciminoritatajn reprezentantojn. Post kiam Ĉing-dinastio translokis sian ĉefurbon al Pekino, ĝiaj imperiestroj traktis ŝtatajn aferojn ankaŭ tie dum ilia inspektado de la orientaj regionoj. La Feniksa Domo estas la plej grandioza el la mezpartaj konstruaĵoj. Ĝi estas tri-etaĝa en la posta korto de la imperiestra palaco, staranta sur bazamento. Siatempe ĝi estis la plej alta konstruaĵo en la urbo. Hŭangtajĝi prenis ĝin kiel sian diskutejon pri la militaj aferoj. Starante tie oni povas ĝui la tuturban pejzaĝon kaj matenan sunleviĝon. Tiam la domo estis rigardata kiel unu el la ok famaj

La hotelo Fenikso





La Norda Maŭzoleo



Knabino en manĉura kostumo montras rigardindaĵon al turistoj.

pejzaĝoj de Ŝenjang. Nun junulinaj vestaĵoj de Ĉing-dinastiaj manĉuroj servas al vizitantoj el diversaj lokoj kaj prezentas al ili anekdotojn, okazintajn antaŭe en la palaco kaj la Feniksa Domo.

La okcidenta parto estis provizora loĝejo de la imperiestro Ĉjanlong (1736-1795 en trono). Ĝia ĉefa konstruaĵo estis halo Ŭensu speciala por konservi la kolosan libraron *Siku Ĉĵuanŝu*. Krome tie troviĝis ankaŭ haloj kaj teatra scenejo konstruitaj laŭ la sudaj ĝardenaj stiloj, kie imperiestraj parencoj povis lerni kaj sin amuzi.

La maŭzoleo Fuling (alinomata Orienta Maŭzoleo) situas en la orienta antaŭurbo de Ŝenjang, kie estis entombigitaj Nuerhaĉi, la unua imperiestro de Ĉing-dinastio, kaj liaj edzino kaj kromedzinoj.

La maŭzoleo ĉirkaŭata de rektangula muro frontas al Hunherivero kaj dorse sin apogas al Tjanĝu-monto. Ĝia ĉefa pordo malfermiĝas al la sudo, ambaŭflanke en la fronto viciĝas ŝtonplato por averti deĉevaliĝon, du ŝtonleonoj, ornamaj ŝtonkolonoj kaj ŝtonportaloj. Interne de ĝia ĉefa pordo, ambaŭflanke de la vojo pavimita per brikoj kreskas altaj pinoj, kies abundaj branĉaroj faris la ĉielon mallarĝa kiel fendstrio, kaj bonorde viciĝas paroj da ŝtonaj kameloj, tigroj, leo-

noj kaj aliaj. La norda tereno estas iom post iom pli alta. Sur la ebena teraso kun 108 ŝtupoj troviĝas diversaj konstruaĵoj por laboroj dum la kulto. Pli norde estas kvadrata kastelo, la ĉefa konstruaĵo de la maŭzoleo kun kvar turoj sur la kastelaj anguloj. En la mezo estas la halo Long'en uzata por kulto. Malantaŭ la kastelo estas la lunark-forma konstruaĵo sur la tomba fronto, sub kiu estis enterigitaj Nuerhaĉi kaj lia edzino Jehe-Lala.

Ĝaŭling-maŭzoleo (alinomata Norda Maŭzoleo) situas en la norda antaŭurbo kaj estas tombo de Hŭangtajĝi, la dua imperiestro de Ĉing-dinastio, kaj liaj edzino kaj kromedzinoj.

La maŭzoleo, konstruita sur artefarita monteto de ebenaĵo, havas strukturon similan al tiu de Fuling, sed kun pli granda skalo kaj pli perfekta dispozicio. Iuj ĝiaj konstruaj ornamaĵoj havas tre altan artvaloron, ekz., ĝia fronta pordo havas sur ambaŭflankaj muroj inkrustitajn kolorglazuritajn drakojn belformajn, antaŭ la pordo estas ŝtona portalo, delikate kaj artisme gravurita. En la maŭzolea regiono kreskas pli ol 4 000 altaj antikvaj pinoj, kiuj kune kun la haloj kaj pavilonoj faris la maŭzoleon pli majesta.

La maŭzoleo Ĝaŭling same kiel Fuling estis malpermesita loko

en Ĉing-dinastio. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio ĝi fariĝis Bejling-parko, kie oni riparis la antikvan maŭzoleon, fosis lagon, konstruis kioskojn, pavilonojn kaj pontojn kaj starigis artajn skulptaĵojn.


La plumaj pentraĵoj de Ŝenjang estas famaj metiartaĵoj. Oni lerte faris homfigurojn, montojn, riverojn, palacojn, florojn, birdojn, bestojn kaj aliajn el diversaj plumoj kun malsamaj koloroj kaj per la tradicia ĉinstila pentrarto, reliefo, olepentrarto kaj brodarto. La plumaj pentraĵoj pli kaj pli plaĉas al la turistoj kaj havas grandan debiton.

En Ŝenjang troviĝas kvar hoteloj por alilandaj turistoj, el kiuj la hoteloj Fenikso kaj Amikeco estas kompare komfortaj kaj graciaj, la aliaj estas Ljaŭning-domego kaj Hŭaĉjaŭ-hotelo. Fremdlandaj turistoj ĉie ricevas varman kaj bonan servon. En la urbo ili povos frandi famajn pladojn de Ĉing-imperia kortego.



Krome, la filio de la Ĉina Internacia Turisma Servo fondis novajn turismajn servojn por alilandaj turistoj, kiuj povas lui biciklon por veturi tra la tuta urbo kaj rigardi ordinaran vivon de la tieaj loĝantoj. Ĝi ankaŭ povas aranĝi por ili tranoktadon en domo de kamparanoj, por ke ili vivu kune kun nordaj kamparanoj de Ĉinio.



Komerca strato



*Stela domo de la Orienta
Maŭzoleo*




*Kvadrata kastelo de la
Orienta Maŭzoleo*


La Imperiestra Palaco de Senjang



Statuo en Bejling-parko



La pluma pentraĵo kaj ĝia farejo




ANTIKAJ PONTOJ

de LAN ŜAN

La Ponto Ŝingcjaŭ en la Somera Palaco

La Jad-rubanda Ponto en la Somera Palaco



Sur la vasta teritorio de Ĉinio fluas multaj riveroj, super kiuj troviĝas diversaj pontoj.

Ponto aperis jam en la primitiva socio de Ĉinio. Inspirite de la naturo, oni tiam transportis rivereton per soltrunko, starigis en akvo serion da ŝtonblokoj por transpasi la riveron kaj konstruis kabloponton el rotangoj. Kun senĉesa disvolviĝo de la sociaj produktaj fortoj aperis diversaj pontegoj.

Frue en Ĉin-dinastio (221 a. K. —206 a.K.) estis terasa vojo, uzata speciale por imperiestroj kaj nobeloj, simila al la nuna viadukto. En la Orienta Han-dinastio (25—220 p.K.) jam aperis ĉiuj kvar ĉefaj specoj de ponto, nome traba, arka, penda kaj flosa. En la pasintaj jarmiloj la ĉinaj pontoj, evoluante de simpleco al perfekteco, iom post iom formis sian stilon originalan en la monda pontohistorio.

El bildo-brikoj de Han-dinastio (206 a.K.—220 p. K.) videblas,


ke la tiamaj pontoj plejparte estis ebenaj, kun deklivoj oblikvaj je 45 gradoj ĉe la du ekstretoj. La ponto Juĝaŭfejljang, kiu troviĝas antaŭ la halo Sankta Diino de la templo Ĝinci en Tajjŭan, la ĉefurbo de Ŝanŝji-provinco, estas de la trabo-piliera ponto. Ĝi konstruiĝis en la Norda Song-dinastio (960-1127 p.K.), en formo de kruco metita super kvadrata lageto. En la pasintaj pli ol mil jaroj ĝiaj traboj kaj ŝtonaj pilieroj estis serioze eroziitaj. En 1953 la ŝtato asignis grandan monsumon por ripari la ponton kaj difinis ĝin kiel gravan protektatan historian objekton.


Ĝis nun oni ankoraŭ ne konstatis per fidinda materialo, kiam oni komencis apliki pilierojn en ponto-konstruado. La apero de pilieroj, kies dikeco kaj pezeco povas elteni ondan atakon, kreis favorajn kondiĉojn por ponto-konstruado en profunda akvo kaj akcelis la disvolviĝon de ponto-konstruado. El la antikvaj pontoj kun ŝtonaj pilieroj kaj traboj

la ponto Lŭojang en la urbo Ĉjŭanĝoŭ de Fuĝjan-provinco estas la plej fama. Ĝin oni komencis konstrui en 1053 kaj finis en 1059. La ponto troviĝas ĉe la enfluejo de la rivero Lŭojang kaj havas 47 spanojn kun longeco de 1 200 metroj kaj larĝeco de 5 metroj. Ĝi aspektas tre grandioza. Sur la ponto staras 500 balustradaj kolonetoj, 28 ŝtonaj leonoj, 7 ŝtonaj kioskoj kaj 9 ŝtonaj pagodoj. Nun ĝiaj ŝtonaj traboj estas anstataŭigitaj per ferbetonaj kaj ĝi fariĝis ŝosea ponto.

La apero de arka ponto estis granda progreso en la pontokonstrua historio. Ĝi havis belan formon, ŝparis materialojn kaj povis elteni grandan ŝarĝon, tial ĝi estis ĝenerale aplikata en Ĉinio. La plej fama ponto de tiu speco estas Anĝji-ponto, alinomata Ĝaŭĝoŭ-ponto, en Ĝaŭŝjan-gubernio de Hebej-provinco. Ĝi havas historion de pli ol 1 300 jaroj kaj estas la plej antikva ponto de Ĉinio. Ĝi, super la rivero Ŝjaŭŝuj, longas 50.82 metrojn kaj

Lugoŭ-ponto





La 16-arkaĵa Tajping-ponto kun longeco de 260 metroj konstruita en la jaro 1234 en Ŝeŝĵan-gubernio, Anĥuj-provinco

larĝas 9.6 metrojn kun unu arka spano de 37 metroj. Sur la ŝtona arko en ĝiaj du ekstretoj troviĝas po unu malgranda arkokulverteto por malpezigi la ponton kaj grandigi ĝian inundakvo-ellasan kapablon, kio estis senprecedenca en la monda pontokonstrua historio.

Influante de la konstrua stilo de Anĝji-ponto, en diversaj lokoj aperis ŝtonaj arko-pontoj en malsamaj formoj. Inter ili Ĝjimej-ponto en Ĝaŝĵan-gubernio havas sian originalecon kaj du spanojn, sur kiuj staras tri etaj. Ĝiaj balustradoj havas originalan formon kaj delikatajn gravuraĵojn.

Estas diversformaj arkoj de la ŝtonaj arkopontoj de Ĉinio, kiaj duoncirkla, ebena, pinta, ovala, kvin-edra, petala kaj parabola. Inter ili la plej bela estas la Jadrubanda Ponto super la okcidenta digo en la Somera Palaco de Pekino. Ĝi, konstruita en la 18-a jc., el blanka ŝtono, havas ovoforman pintan arkon kaj iom su-


pren-leviĝantan formon, similan al kamela ĝibo, tial ĝi alinomiĝas Kamelĝiba Ponto. Ambaŭflanke de ĝi etendiĝas ebena longa digo, kiu kontrastas kun la vasta Kunming-lago, kvazaŭ la luno brakumita de drako, kio faras la pejzaĝon pli bela.

Ankaŭ Lugoŭ-ponto super Jongding-rivero estas fama tra Ĉinio. Ĝi konstruiĝis en 1189 p. K. kun longeco de 266.5 metroj, larĝeco de 7.5 metroj kaj 11 spanoj. Ambaŭflanke de la planko staras po 140 gravuritaj ŝtonplatoj kaj ŝtonkolonoj. Sur la

La ponto Juĝaŭfejljang



ŝtonkolonoj estas gravuritaj multaj versimilaj leonoj en diversaj pozoj. Por nombri ilin oni devas multe klopodi! En 1962, koncerna departemento faris al ili nombradon foje refoje kaj fine trovis sur la ponto 485 diversgrandajn leonojn. Poste oni trovis unu grandan leonon sur la centra piliero kaj dekkelkajn leonetojn. Ilia totala nombro nun estas 502. Post sia finkonstruiĝo, la loko fariĝis fama vidindejo. Estas granda ĝojo por turistoj nombri ŝtonleonojn tie.



La 800-jara Gŭangĝji-ponto en Cai'an, Gŭangdong-provinco

Por ke ponto estu pli bela kaj praktike uzata, oni konstruas sur ponto antaŭ pont-ekstretoj portalon, kioskon aŭ pavilonon en nacia stilo. La ponto Dujjun-ĝjicuj en Bejhaj-parko de Pekino havas ĉe siaj du ekstretoj po unu altan portalon. En la Somera Palaco troviĝas la ponto Ŝingĉjaŭ, sur kiu majestas pavilono kun orkolora tegmento kvar duoblaj kornicoj kaj graciaj blankmarmoraj balustradoj. Sur la ponto oni povas ĝui panoraman vidon de Kunming-lago. La Kvinkioska Ponto de Ŝoŝjihu-lago de Jangĝoŭ, Ĝjangsu-provinco, estas fama vidindejo de la urbo. Sur la ponto kvar malgrandaj kioskoj ĉirkaŭas altan kioskon kun duoblaj kornicoj.

Krom lignaj kaj ŝtonaj pontoj, super ravinoj kaj riveroj rapidflujaj, kie estas malfacile starigi pilierojn, troviĝas nur pendo-pontoj. La plej simpla ponto estas solkabla ponto. La Geedza Ponto troviĝas ĉe la digo Duĝjangjan en Gŭanŝjan-gubernio, Siĉŭan-provinco. Legendo diras, ke ĝi estis konstruita de He Ŝjande kaj lia edzino en la komenco de la 19-a jc. Ĝi transpontos la Internan kaj Eksteran Riverojn de Mingĝang-rivero, altas 11 metrojn kaj longas pli ol 330 metrojn kun pluraj spanoj, el kiuj la plej gran-

da longas 61 metrojn. Ĝi estas kunligita per dek bambuaj kabloj, sur kiuj estas metitaj lignaj tabuloj premataj de du bambuaj kabloj. Ambaŭflanke de la ponto estas po ses bambuaj kabloj kiel balustradoj. Trapasantoj sur la ponto ofte teruriĝis pro ĝia balanciĝo en vento. En 1965, kiam oni konstruis Duĝjangjandigon, la bambuaj kabloj estis anstataŭigitaj per ŝtalaj kabloj 25 mm. dikaj.

Apud Panggu-vilaĝo de Lŭoju-regiono, Tibeto, troviĝas rotangkabla ponto pli ol 130 metrojn longa, kiu superpontos la riveron Jarlung Zangbo, 40 metrojn super la akva surfaco, kaj konsistas el 47 dikaj rotangaj kabloj, ligataj sur fostoĵoj kaj arbegoj de la orienta ĝis la okcidenta bordoj. 20 rotangaj cirkloj simetrie faris la kablojn en longan cilindron, la punta planko estas farita el maldikaj rotangoj. La ponto havas tre apartajn strukturon kaj formon.

Luding-ponto super Dadu-rivero en Luding-gubernio de Siĉŭan-provinco estas fama ferĉena ponto de Ĉinio. Ĝi konstruiĝis en 1705 p. K., kun longeco de 103

metroj kaj larĝeco de 2.8 metroj. Ĝi estas kunligita per 9 ferĉenoj, ĉiu el kiuj 127.45 metrojn longa kaj konsistas meznombro el 890 ovalaj ringoj. Sur la ĉenoj metiĝas lignaj tabuloj kaj ambaŭflanke estas po du ĉenoj por helpi la pasantojn.

MONATO

internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj
esperanto-revuoj

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

LA ĈINA DANCA KONKURSO



Li Mjaŭmjaŭ (la dua de maldekstre) kaj ŝiaj instruistinoj

La Unua Lernanto-pokala Danca Konkursito de Ĉinio okazis en Pekino de la 25-a ĝis la 31-a de aŭgusto, 1985. Ĝi estis grand-skala konkursito pri klasikaj kaj popolaj dancoj, en kiu partoprenis ĉefe dancartaj lernejoj de la lando. Konkursitis ĉirkaŭ 200 lernantoj, diplomitoj kaj dancistoj premiitaj en landa, provinca aŭ urba konkursito, kiuj venis el la Pekina Dancarta Instituto, Ŝanhaja Dancarta Instituto, Ĝuangdong-a Dancarta Lernejo, Siĉŭan-a Dancarta Lernejo, arta fakultato de la Centra Naciminitata Instituto kaj Arta Instituto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. La konkursito iris en du grupoj: la geknaba grupo (malpli-ol-18-jara) kaj la plenaĝula grupo (malpli-ol-28-jara).

La rezultoj plene montris la streĉitecon kaj intensecon de la konkursito. Liŭ Min el la Ensemblo de la Ĝenerala Politika Departemento de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj Ŭang Mingĝu el la Ŝenjang-a Ensemblo paralele gajnis la unuan premion de la plenaĝula virina grupo per 115.52 poentoj sume (plena poentaro estas 120). Hu Ĉjong el la Arta Instituto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj Li Mjaŭmjaŭ el la Dancarta Lernejo sub la Ŝenjang-a Konservatorio paralele gajnis la unuan premion de la knabina grupo. Li Hengda el la Pekina Dancarta Instituto gajnis la unuan premion de la plenaĝula vira grupo per totala poentaro de 114.50 kaj tiun de la knaba grupo gajnis Ĝin Ŝing el la Arta

Instituto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

La konkursitoj de la plenaĝula grupo intense iris en kvar rondoj. La nivelo de la konkursantoj estis preskaŭ identa, pro kio estas malfacile distingi la superan disde la ordinaraj. Ŭang Mingĝu el Ljaŭning-provinco gajnis dek poentojn, la plenan poentaron, en la duaronda danca konkursito pri tenado de ekvilibro per stabileco kaj malstreĉiteco, plastika beleco kaj esprimiveco. Ankaŭ Liŭ Min gajnis dek poentojn en la konkursito pri ruliĝado kaj saltado per malfacilaj, harmoniaj kaj kontinuaŭ dancmovoŭ. En la popol-danca konkursito la mongola danco, prezentita de Kang Ŝaŭhuj, kiu gajnis la duan premion de la vira grupo, per plena poentaro



Liŭ Min, Ŭang Mingĝu kaj Li Hengda (de maldekstre)

grupo ankaŭ aperis nombro da promesplenaj debutintoj. Tri dancistoj gajnis la unuan premion de la geknabaj grupoj, ĉiu preskaŭ per plena poentaro en la konkurso pri bazaj ekzercoj kaj en la finalo pri dancteatra prezentado. Inter ili ja estas la 17-jara Ĝin Ŝing, kiu gajnis 44.94 poentojn (la plena poentaro estas 45) en la finalo pri tia prezentado.


Inter la konkursantoj troviĝis elstaraj artistoj antaŭlonge jam bone konataj de la enlandaj spektantoj, ekz., la 28-jara Liŭ Min, konsilanto de la Ĉina Dancista Asocio, gajnis la unuan premion en la tutlanda konkurso pri dancteatra prezentado okazigita en

montris artan ĉarmon propran al la mongola danco en ritmoj, movoj, stilo, temperamento, esprimo kaj individuaj karakteroj.

La dancistoj havis ne nur grandan lertecon, sed ankaŭ fortan dancokonscion kaj plene esprimis la nacian stilon. Ekz., en la finalo de la lasta rondo, la solodanco "Ŭang Ĝaŭĝjun" prezentita de Liŭ Min kaj priskribanta pri la edziniĝo de han-nacieca virino al nacimalplimulta ĉefo en la antikva Ĉinio, esprimis ŝian morozcon kaj nostalgion al la patrolando per subtilaj movoj de manoj, okuloj kaj piedoj kaj havis fortan guston de la ĉina nacia danco. Ŝi per sia brila prezentado grajnis 10 poentojn. En la finalo de la tria rondo de la plenaĝula vira grupo, la solodanco "Demandoj al la Ĉielo" prezentita de Li Hengda elvokive montris la noblan karakteron kaj nesubigeblan spiriton de Ĉju Jŭan, granda antikva poeto de Ĉinio. Li rikoltis tondran aplaŭdadon de la spektantoj. En la konkurso li gajnis 9.95 poentojn.

En la konkurso de la geknaba

Liŭ Min prezentas la soldancon "Ŭang Ĝaŭĝjun".



1979. Kun kreskado de aĝo, ŝia prezent-arto perfektigas tagon post tago. Nun ŝia plej granda deziro estas krei eternan scenejan figuron kun latentaj karakteraj fortoj per sia pasio.

Plejparto de la dancistoj de la geknabaj grupoj ne havis sperton pri konkursado. Ekz., la malpli-ol-17-jara Hu Ĉjong, kiu gajnis la unuan premion, estas naiva kaj obstina knabino. En la 10-jara aĝo, ŝi kun iu nekonata parenco veturis de Ĉongĉing, en sudokcidenta Ĉinio, al Pekino, por anonci sin al la Arta Instituto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Tiam ŝia staturo estis nur mezbo-

na. Ŝia obstineco tamen emociis la ekzamenantojn kaj ŝi estis akceptita kiel escepto. En la tria lernoĵaro la nivelo de ŝiaj dancmovoĵoj eĉ leviĝis de la mez- aŭ malsupera nivelo al la unuagrada, kion ŝi tenis ĝis la diplomitiĝo. Ŝi, neniam ludis ĉefan dancfiguron, kaj prezentis nur dancojn kun simplaj sentimentoj. Ŝi tre bedaŭris, ke ŝi ne profunde komprenis la de ŝi ludatan rolon en tiu ĉi konkurso. Oni devas pardoni, ke ŝi, knabino, prezentis la rolon de la virino, kiu havas kaj edzon kaj infanon. Kompreneble, ŝia nekontenteco progresigos al ŝi la dancarton.

Li Hengda prezentas la dancon "Demandoj al la Ĉielo".



Gin Sing

Jam finiĝis la danca konkurso. La ĉinaj dancistaj rondoj estas kuraĝigitaj de la amaso da novaj dancartaj talentuloj en tiu ĉi konkurso. La ĉina dancarto havas longan historion. Kiel ĉerpi tradiciajn nutraĵojn kaj revigligi la ĉinajn klasikajn kaj popolajn dancojn estas problemo aparte atentata de la ĉinaj dancistaj rondoj. En la paŭzo de la konkurso Ĝja Zŭogŭang, vicprezidanto de la Ĉina Dancista Asocio, faris raporton. Li varme laŭdis la eminentan dancarton de la konkursantoj kaj alvokis, ke la ĉinaj dancistaj rondoj klopodu por ke la ĉinaj klasikaj kaj popolaj dancoj atingu grandan progreson kaj okupu sian meritatan lokon en la monda dancarto.



Tarifo: 1 internacia respondkupo-
no por 5 vortoj aŭ mallongigoj.
Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por
spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj
kunlaborantoj ĝuas 30% da raba-
to. Esp. organizoj povas senpage
aperigi anonceton kun maksimu-
me 50 vortoj. La redakcio ne res-
pondecas pri la enhavo de la anon-
cetoj, nek pri la plenumado de la
promesoj faritaj en ili.

* Irineu dos Reis Paiva, deziras
korespondi kun geesperantistoj
el la tuta mondo pri diversaj tem-
oj. Adreso: P.O. Kesto 200.
Campina Grande-PB/58100, Bra-
zilo.

* 49-jara usona fraŭlo deziras ko-
respondi kun fraŭlino kiu havas
intereson pri herboj, ĉinaj res-
nigaj metodoj, Taijiquan, Wushu
aŭ la similaj. Mi intencas viziti
Orienton en printempo. Sid Ta-
naban, 3456, 22nd st., 1, San
Francisco, CA 94110, Usono.

* 30-jara instruisto Ma De-sheng
dez. kor. kun geamikoj el Usono
kaj Anglio pri diversaj temoj.
Adreso: Angla Fakultato, Hai-
nan Universitato, Hainan Insulo,
Ĉinio.

* 19-jara studento Sieh Ning,
P.O. Box 83006, Beijing Univer-
sity, Beijing, Ĉinio, volas kores-
pondi kun esperantistoj angle,
france aŭ germane.

* Argentina Esp.-Grupo vokas le-
terojn k. bild-kartojn tutmonde
kaj respondos ĉiujn. Ankaŭ pre-
tas individue korespondi pri
ĉ.t. Adreso: Esperanto-Grupo,
Casa de Cultura, Grl. Paz 48,
2550 Bell Ville-Argentino.

* 32-jara Gerald Roemer, Lutte-
rothstrasse 17, D-2000 Hamburg
20, FR Germanio, deziras ko-
respondi kun ĉina esperantisto
pri arkitekturo, urboplanado,
mediprotektado kaj aliaj temoj.

LITERATURAJ VERKOJ

Montara Vilaĝo (romano)	272pĝ.	£3,85	US\$7,80	10-Es-1882S
Bronza Tigro (dramo)	138pĝ.	£2,90	US\$5,90	10-Es-1945S
Verkoj de Verda Majo	510pĝ.	£4,20	US\$8,50	10-Es-1653S
Bukedo al Vi (mikronoveloj)	96pĝ.	£0,65	US\$1,30	10-Es-1881P

POPOLAJ RAKONTOJ:

Rakontoj pri Afanti	78pĝ.	£0,65	US\$1,30	10-Es-1578PA
Saĝo-sako	78pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1778P
La Feliĉa Birdo	56pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1866P
Papilia Fonto	68pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1883P
Magia Ŝipo	76pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1623P

FENIKSA LIBRARO:

40 Vidindaj Lokoj en Ĉinio	272pĝ.	£1,90	US\$3,90	12-Es-1825P
Dek Ses Urboj de Ĉinio	176pĝ.	£1,90	US\$3,90	17-Es-1885P
Mia Vivo	128pĝ.	£0,80	US\$1,70	17-Es-1884P
Pitoreska Pekino	74pĝ.	£0,95	US\$2,00	17-Es-1827P
Albumo pri Ĉinio	98pĝ.	£1,90	US\$3,90	85-Es-175P

INFANLIBROJ:

Knabino Ginsengo	40pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-177P
Hejmoj de Birdoj	40pĝ.	£0,95	US\$2,00	88-Es-203P
Kolorigu	120pĝ.	£2,90	US\$5,90	88-Es-205P
Bonkora Ŝjaudon	60pĝ.	£1,10	US\$2,30	88-Es-204P
Brava Kolombido	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-244P
Petolema Kaprido	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-241P
Lutro kaj Bufo	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-242P
Kokido Venĝis Sian Panjon	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-246P
Du Katetoj	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-243P
La Fiera Generalo	24pĝ.	£0,50	US\$0,95	88-Es-65P
Lupo Invitas Urson	40pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-189P
Senmortigaj Fruktoj	68pĝ.	£0,50	US\$0,95	88-Es-194P
Serĉi Panjon	28pĝ.	£0,50	US\$0,95	88-Es-191P
Plaŭ! Plaŭ!	60pĝ.	£1,10	US\$2,30	88-Es-201P
En la Bestoĝardeno	80pĝ.	£1,30	US\$2,60	88-Es-174P
Magia Peniko	40pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-178P
Anaseto kaj Koketo	28pĝ.	£0,35	US\$0,70	88-Es-176P
Ora Hakilo	32pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-195P
Kiel Kovi	28pĝ.	£0,50	US\$0,95	88-Es-196P
Malatentema Virino	24pĝ.	£0,50	US\$0,95	88-Es-197P
Vostkonkurso	16pĝ.	£0,30	US\$0,65	88-Es-200P
Konstrui Novan Ponton	40pĝ.	£0,22	US\$0,40	88-Es-156P
Bela Revulo	40pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-152P
La Fiera Multkolora Kateto	44pĝ.	£0,95	US\$2,00	88-Es-154P
Mapo de la Ĉina Popola Res- publiko		£0,50	US\$0,95	12-Es-176P

Mendu ĉe: **Libroservo de UEA**

Perantoj de EPC

aŭ **Internacia Libro-Komerca Kompanio
de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), Es-
peranta Sekcio, P.O. Kesto 313, Bei-
jing, Ĉinio**

ĈINAJ TRADICIAJ FAMILIOJ FRONTAS AL NOVAJ PROBLEMOJ

En la 8-a de januaro de la lasta jaro, en la Pekina Vesperĵurnalo aperis artikolo kun titolo "Ĉinaj Tradiciaj Familioj Frontas al Novaj Problemoj". En pli ol unu monato post la apero ĉ. mil personoj sendis al la redakcio siajn kontribuojn pri la diskutata temo. Iuj laboristoj kaj oficistoj skribis komunan leteron por esprimi siajn opiniojn. Ili opiniis, ke tiu problemo koncernas internajn aferojn de sennombraj familioj kaj estas diskutinda. Ĉi-sube ni aperigas la supre diritan artikolon kaj kelkajn citaĵojn el koncernaj leteroj, kio eble helpos niajn legantojn koni iujn ŝanĝigojn en la familioj de la nuna Ĉinio.

LA RED.

Dialogo inter du ĉ. 30-jaraj virinoj en aŭtobuso

"Vi tro malgrasiĝis."

"Kial ne?! Krom labori, matene mi hastas porti mian infanon al infanvartejo kaj vespere mi devas preni ĝin hejmen. Post laboro min atendas amaso da dommastrumaĵoj."

"Ĉu viaj bogepatroj ne helpas vin?"

"Ili jam emeritiĝis. Tamen ili ne volas prizorgi la infanon."

"Sed ili devas pripensi per si mem, ke iliaj posteuloj prizorgos ilin, kiam ili benozos alies prizorgon."

Su Ŭenŝjang (la unua de maldekstre), la aŭtoro de la artikolo "Ĉinaj Tradiciaj Familioj Frontas al Novaj Problemoj", kune kun siaj kolegoj legas leterojn de loĝantoj.



Opinio de profesoro Fej Ŝjaŭtong

Ĉina sociologo Fej Ŝjaŭtong prezentis du malsamajn tipojn koncerne al la intergeneraciaj rilatoj en la familio.

En okcidentaj landoj la familioj estas de tipo de stafetkurado: nur la antaŭa generacio portas respondecon por la posta. La gepatroj devas kulture siajn gefilojn ĝis ilia plena elkresko, kaj poste ĉesas la respondeco, kio similas al stafetkurado.

La tradiciaj familioj de Ĉinio estas de tipo de retronutrado. Gepatroj devas kulture ne nur siajn gefilojn ĝis ilia plena elkresko, sed ankaŭ la genepojn, se ili vivas kune kun siaj gefiloj. Kaj poste la gefiloj flegas kaj nutras la maljunulojn.

Grava ĉenero por teni la tipon de retronutrado estas vartado de la tria generacio far la geavoj. Tial, ĉinaj sociologoj opinias, ke la vartado al la tria generacio kaj la retronutrado al maljunuloj servas kiel aparta familia asekura sistemo.

Latenta malfacila problemo

Lastatempe iu esploranto de la familia problemo montris, ke la gepatroj, kiuj ne volas varti siajn genepojn kaj rifuzas doni helpon al siaj plenkreskaj gefiloj, kiuj renkontas malfacilaĵojn, opinias, ke ili bone plenumis sian respondecon, tio signifas, ke la intergeneracia rilato en la familio jam disvolviĝas al la tipo de stafetkurado de okcidentaj landoj.

Kiam la vartado al la tria generacio far la geavoj estas minacata de rompiĝo, la bazo de la retronutrado certe ŝanceliĝos. Tie kuŝas malfacila problemo: Kion fari, kiam la gepatroj maljuniĝos kaj perdos laborkapablon?

Kompreneble, la familia problemo ne estas klarigebla per simpla tipo, kaj en tio ne tute kulpas maljunuloj. Iuj plenkreskaj gefiloj forpuŝas ĉiujn hejmlaborojn al la maljunuloj, aliaj eĉ turmentas la maljunulojn anstataŭ fari retronutradon. Kompreneble, estas malmultaj la familioj, en kiuj la junuloj ne prizorgas la maljunulojn aŭ la lastaj ne helpas la antaŭajn. Tamen, estas atentindaj la novaj problemoj alfrontataj de la tradiciaj familioj en Ĉinio.

La ĝusta vojo por solvi tiun ĉi problemon estas energie kuraĝigi konstrui harmoniajn familiojn kaj disvolvi la bonan tradicion respekti la maljunulojn kaj ami la infanojn.

Su Ŭenjang, ĵurnalisto
de la vesperĵurnalo
La 8-an, januaro

La bazo de la retronutrado ne estas varti la trian generacion

Grava ĉenero por teni la tipon de retronutrado en Ĉinio ne devas esti vartado de la tria generacio sed tiu de la dua generacio. La gepatroj ĝuas la rajton de retronutrado pro tio, ke ili kulturis siajn gefilojn ĝis ilia plena elkresko. Ne necesas kaj ne devas esti la antaŭkondiĉo, ke ili devas varti la trian generacion. Pro ĉiaj kialoj maljunuloj ofte ne povas varti siajn genepojn.

Pu Ŭej
La 12-an, januaro

Dorlotataj infanoj malfacile varteblaj

Kial la maljunuloj de sufiĉe multaj familioj ne volas varti siajn genepojn, kaj flegigas ilin en infanvartejoj aŭ dungas por ili vartistinojn? La kialo estas, ke la plejparto de la infanoj estas solinfanoj dorlotataj de siaj gepatroj. La gepatroj estas obeemaj antaŭ siaj "malgrandaj princoj" kaj "dorlotataj princinoj". Kompreneble, la maljunuloj ne kuraĝas flegi tiajn infanojn.

Laboristo-pensiulo Ju Ming
La 13-an, januaro

"Retronutrado" jam ne ekzistas

Mi opinias, ke la strukturo de la nuna familio tute diferencas de tiu de la pasinteco. Antaŭe, la gepatroj ekonomie vivis por ŝpari monon kaj klerigi siajn gefilojn. Post kiam la filoj komencis sin vivteni, la gepatroj ankoraŭ ĉiamaniere protektis ilin por ke iliaj gefiloj vivtenu ilin en ilia maljuneco. Nun la stato jam ŝanĝiĝis. En la urboj preskaŭ ĉiuj maljunuloj ricevas pension kaj ne bezonas monhelpon de siaj gefiloj. En la pasinteco en la familio la filo laboris, la bofilino mstrumis hejme kaj la maljunuloj estis nur ŝiaj helpantoj. Nun, la filo kaj la bofilino ambaŭ profesias kaj havas nek energion nek tempon por prizorgi la maljunulojn, kaj tiel la maljunuloj estas ŝarĝitaj per ĉiuj hejmlaboroj. Antaŭe, en la familio la konfliktoj okazis plejparte inter la aroganta bopatrino kaj la bofilino. Nun la plejparto de la bofilinoj estas okupitaj pri sia laboro, el ili multaj respektas siajn maljunulojn nur buŝe, sed ne

praktike.

71-jara malsanulo Hong Fej
La 18-an, januaro

Multeprofita vartado al la tria generacio

Mia familio apartenas al tiu de la tipo de "retronutrado" kaj mi estas por tiu metodo.

1. La mezaĝa generacio estas tro okupita, dum la maljuna generacio estas libera. Tiukaze, la racia labordivido devas esti farata, ke ili ĉiuj faru sian kontribuon respektive en laboro kaj en dommastrumado. 2. Se la maljuna kaj mezaĝa generacioj havas preskaŭ saman instruitecon, la antaŭa havas pli multe da tempo kaj povas pli bone eduki la trian generacion. 3. La plej timinda por la maljunuloj estas senhelpeco en ilia maljun-aĝo, tia senhelpeco estas ne en ekonomio, sed en fizika forto kaj spirito. La "retronutrado" garantias la trankvilan vivon de la maljunuloj en ilia maljunaĝo. La harmonio de la familio alportas pacon al la socio kaj la ŝtato. Kial oni ne proponu tian bonan metodon?

Song Ŝangda, emerito de
la Pekina Poŝtejo
La 20-an, januaro

Kiel solvi la kontraŭdiron inter laboro kaj kulturado al la infanoj?

La plej zorginda por mi estas, kiel solvi la kontraŭdiron inter laboro kaj kulturado al la infanoj. Ekzemple, la mezaĝaj intelektuloj situas en la pozicio daŭrigi la aferon de la maljuna generacio kaj kulturi la junan, kaj estas la kerna forto en la ŝtata konstruado. Tamen ili ĉiuj havas pezan taskon varti siajn infanojn (ordinare du). La stato ne lasas ilin kaj plene disvolvi sian kapablon

Juna patrino akompanas sian infanon al vartejo.



en la laboro kaj efike kulturi siajn infanojn. Ŝajne oni devas diskuti por trovi bonan solvon konforme al la aparta stato ekzistanta en Ĉinio.

Gong Ĉunsen de Radio Pekino
La 20-an, januaro

Kio estas la normo de bona bofilino?

La plejparto de la bofilinoj, kiujn mi konas, volas harmonie vivi kun siaj bopatrinoj kaj ne volas malpaci kun ili. Estas du kialoj, kiuj kaŭzas malakordon inter la bopatrino kaj bofilino:

1. Pro malsamaj travivaĵoj, vivmedioj kaj kutimoj de la bopatrino kaj bofilino iom post iom formiĝas inter ili kontraŭdiroj.

2. Iuj bopatrinoj tro severe traktas siajn bofilinojn. Ekzemple, ili postulas, ke la bofilinoj faru ĉiujn hejmlaborojn. La bopatrinoj ne kontentas kiam la bofilinoj lasas siajn edzojn fari iom da hejmlaboroj. Tial la bofilinoj havas ankaŭ multajn neeldireblajn ĉagrenojn.

Iu bofilino
La 22-an, januaro

Kultura diferenco estas grava kaŭzo de la familiaj kontraŭdiroj

En mia familio vivas tri generacioj. Pro diferenco en instruiteco la pasioj, interesoj kaj vivmanieroj de la du generacioj estas malsamaj.

La gepatroj ŝatas pekinan operon, dum ni junuloj ŝatas kantoperon kaj amas rigardi diversajn pilkkonkursojn. Pro tio ofte okazas malgrandaj konfliktoj antaŭ la televidilo. En la postlabora vivo, la maljunuloj volas kvietecon, dum ni junuloj volas aktivadon. En edukado al la infanoj ofte okazas malakordoj. Ni volas fari severan kaj pli fruan edukadon al la infanoj, dum la maljunuloj dorlotas ilin, timante, ke ili estos tro ŝarĝitaj per lernado, kaj precipe estas korprenmitaj, kiam ili ploros.

Juna patro
La 24-an, januaro

Nur ni ne povas bone flegi la maljunulojn

La gepatroj ne nur kulturis nin gefilojn, sed ankaŭ flegis niajn infanojn. Ni devus kiel eble plej bone flegi la maljunulojn, tamen ni ne povas tion fari. Neniu el ni loĝas ĉe niaj gepatroj. Iuj laboras en aliaj lokoj kaj povas viziti la maljunulojn nur unufoje en ĉiu 4-a jaro. La aliaj, laborantaj en antaŭurbo de Pekino, ne povas en ĉiu ripoztago viziti la maljunulojn. Krom monhelpo

ni povas fari nenion por niaj maljunuloj, kvankam ni ĉiuj tre deziras fari ion por ili.

Ni proponas, ke la loĝkvartalaj komitatoj organizu homfortojn por bone flegi sialokajn grandaĝajn maljunulojn. Se okazos io kriza, ili povas helpi nin en la flegado de la maljunuloj. Se tiel, ni kaj niaj maljunuloj estos trankvilaj.

Jŭan Jŭan
La 29-an, januaro

Protokolo de kunsido

Antaŭtagmeze de la 11-a de februaro, laŭ invito de la redakcio de la vesperjurnalo, esploristoj de la Sociologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj havis kunsidon pri la familia problemo diskutata de la pekinaj loĝantoj. Ĉi-sube estas la protokolo de la kunsido.

“Flegado al la tria generacio” estas nova problemo

En la malnova Ĉinio, la taskoj de la virinoj estis naski infanojn kaj flegi bogepatrojn. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la virinoj ĝenerale profesiigis. Pro neperfekta sociaj servoj aperis la “flegado al la tria generacio”. Tio estas du formoj: unu estas rekta flegado de la maljunuloj al la tria generacio kaj la alia monhelpo.

Ne devas esti nur unu sola tipo de familioj

Estonte ne devas esti nur unu sola tipo de familioj, kaj ankaŭ la flegado al juna generacio devos esti diversmaniera. Laŭ enketo, en la urboj estas multe da familioj, en kiuj la gepatroj harmonie vivas kun siaj filinoj kaj bofiloj.


La tradiciaj familioj devas esti protektataj

Laŭ produkta nivelo de la nuna socio, la tradiciaj familioj en Ĉinio devas esti protektataj. Laŭ enketo, en nemalmultaj urboj la familioj, en kiuj loĝas tri generacioj, konsistigas duonon de ĉiuj familioj. Tiaj familioj bone kombinas flegadon de la maljunuloj kaj vartadon de la infanoj. La tri generacioj harmonie kunvivas.

Reordigi la interrilatojn inter la familianoj kaj disvolvi la sociajn servojn

La vartado de la gepatroj al siaj gefiloj kaj tiu de la gefiloj al siaj gepatroj ne devas esti rigardataj kiel interŝanĝo, sed kiel interhelpo kaj interutilo. La reordigo de la interrilatoj inter la familianoj celas respekti unu alian kaj subteni sin reciproke. Disvolvi la sociajn servojn estas la plej bona metodo por solvi la novajn problemojn en la interrilatoj de la familianoj en la nova periodo.

ABELOJ



En la lasta aprilo mi havis la ŝancon min refreŝigi kelke da tagoj en la sanatorio Conghūa de antaŭurbo de Kantono. Ĝin ĉirkaŭas montoj, kun granda lago en la mezo. La lagobordo kaj montoj estas kovritaj de liĉi-arboj. La pejzaĝo estas tre bela.

Liĉio estas unu el la famaj fruktoj de Gŭangdong-provinco. Kiam la liĉi-arboj floras, la abeloj laboras tuttage kaj ĉie aŭdiĝas nur abelzumado. Eĉ vespere oni ankoraŭ povas vidi sennombrajn abelojn sur la helflavaj floroj de liĉi-arboj. La bongusta liĉia mielo estas utila al la sano de homoj. Gustuminte tiom dolĉan mielon, mi ekintencis rigardi la abelojn.

Inter la liĉi-arboj troviĝas multaj blankaj dometoj, kie loĝas abeloj. Laboristoj nomas ilin abeldomoj. Alproksimiĝante al la dometoj, mi vidis, ke multege da abeloj rapide flugas al aŭ el abelujoj. Tio pensigis min: "Ankaŭ la abeloj konstruas sian novan vivon!"

Maljuna laboristo kondukis min al abeldomo kaj malfermis abelkeston kun multemultaj moviĝantaj abeloj. Li mallaŭte diris: "Rigardu, kiel obeemaj estas

tiuj insektoj!" Mi demandis lin: "Kiom da mielo produktas unu kesto da abeloj en jaro?"

Li respondis: "Dekojn da ĝinoj*. La abeloj senripoze laboras de printempo ĝis vintro. Ili donas multe da mielo, sed tre malmulte konsumas. Ĉiufoje, kiam ni forprenas la mielon, ni restigas al ili nur tiom, kiom sufiĉas por ilia nutrado."

Subite venis al mi en la kapon la demando: "Kiom longe la abelo povas vivi kutime?"

"La laborabelo povas vivi maksimume ses monatojn," respondis la laboristo.

"Se tiel, do mortintaj abeloj ofte vidiĝas en abelkesto, ĉu ne?"

La laboristo kapneis, dirante: "Neniam. La abeloj estas tre saĝaj. Kiam ili ĝisvivas 5-6 monatojn, ili mem trankvile mortas ekstere."

Liaj vortoj profunde gravuriĝis en mia koro. Kiel amindaj abeloj! De la homoj ili postulas nenion, sed donas al ili multon.

* unu ĝino = duonkilogramo

Respondoj de la interesaj demandoj:

1. Antaŭhieraŭ, hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ, postmorgaŭ.
2. Kiam la longa montrilo de horloĝo montras al "2", ni diras "10".
3. La demando: "Ĉu vi endormiĝis?"
4. Mi.
5. Haltinta horloĝo.

Solvo por transformiĝo:



Solvoj por enigmoj:

1. Ovo. 2 Steloj.

SUN SJAŬĈEJ:

EN LA “LOĜEJO DE FEOJ”



Sida budhostatuo alta pli ol 20 metrojn

En la vortoj pri budhismo en Ĉinio estas la diro de “loĝejo de feoj”. Ĝi ja estas Sumeru-monto, branĉo de Liŭpan-montaro, en la Ningŝja-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono, nordokcidenta Ĉinio. En tiu impona monto troviĝas ŝtonkavernaro du kilometrojn longa, kiu estas raraĵo de la arta trezorejo en Ĉinio. Tie kreskas densaj pinoj kaj cipresoj, fluas riveretoj en ravinoj kaj de antikve estas fama budhisma sanktejo.

Kruta vojo de Sumeru-monto



La ŝtonkavernaro estis konstruita en la Norda Ŭej-dinastio (386-534 p. K.). Post la Okcidenta Ŭej-dinastio (535-557 p.K.), la Norda Ĝoŭ-dinastio (557-581 p. K.) kaj Suj-dinastio (581-618 p. K.) ĝi prosperis en Tang-dinastio (618-907 p. K.). Nun ankoraŭ


konserviĝas ĉ. 130 kavernoj kaj 200 budhaj statuoj kaj niĉoj.

Multaj kavernoj de Sumeru-monto estis konstruitaj sur krutaj rokmuroj. Turistoj devas kapti feran ĉenon kaj treti kavojn ĉizitajn sur rokmuroj por surgrimpi

Budhostatuo en la 51-a kaverno



la monton. En iuj lokoj oni devas premi sian korpon al la rokmuro kaj teni rokfendojn per la manoj por sin movi antaŭen sur tre mallarĝa vojeto inter krutaĵoj, sub kiuj estas abismo. Je ajna malatento la grimpanto povas fali en ĝin. La danĝerplenaj kavernoj sentigas grandan misteron de la monto kaj pri ĝi cirkulas nemalmultaj mitoj. Ĉapitro el la fama ĉina mita romano "Pilgrimado al la Okcidento" rakontas, ke la dia simio Sun Ukong serĉas en Sumeru-monto "Bodisatvon Lingĝji", ke tiu kunportu "Flugdrakan Magian Bastonegon" kaj kune kun li iru al la Flavventa Monto por tie venki la "Flavventan Demonon". Tiel savinte la bonzon Tang Sanzang, Sun Ukong kaj aliaj iris plu al la Okcidento por peti budhismajn sutrojn. La lokanoj kŭtime nomas la monton Paradiza Monto.



Ŝtonkavernaro de Sumeru-monto

Tiuj ŝtonkavernoj konstruitaj en malsamaj periodoj havas malsamajn artajn stilojn. La kavernoj en la periodo de la Nordaj Dinastioj (de la 4-a ĝis 6-a jc. p. K.) havas po unu kvadrata pagodkolono en la centro, kies kvar flankoj surhavas po tri vicoj da malgrandaj niĉoj unu super alia. Sur la muroj de la kavernoj estas skulptitaj statuoj de Ŝakjamunio, Avalokitesvaro, Mahastamaprapto kaj bodisatvoj.

La kaverna aranĝo de Sujdinastio similas al tiu de la Nordaj Dinastioj, sed la centra pagodkolono estas unuetaĝa, kun du statuoj de disĉiploj surmure kiel aldono. Ĝiaj statuoj kun majestaj vizaĝoj kaj dikaj korpoj diferencas de tiuj de la Nordaj Dinastioj kun belaj vizaĝoj. La sesa kaverno konstruita en la komenco de la 7-a jarcento havas tipan karakterizaĵon: En ĝia mezo staras pagodkolono kun sidanta statuo en froko kaj kun afabla

kaj karnoplana vizaĝo en ĝia suda niĉo. Ĉirkaŭe de la malsupra kolono estas statuoj de dancistinoj kun vivecaj esprimoj kaj delikataj pozoj. Sur la plafono estas skulptitaj dancistinoj flugantaj en la ĉielo, kiuj estas vivecaj kaj naturaj. La 7-a jarcento estis la plej prospera periodo por la kaverno de Sumeru-monto kaj atingis senprecedence altan nivelon la nombro kaj skulpturo de ĝiaj kavernoj.

La "Budha Domego", la plej distingiĝa kvina kaverno en hufotformo, estis konstruita sur la rokosurfaco de iu monto. En ĝi estas skulptita digna kaj impona sidanta Majtrejo pli ol dudek metrojn alta. Ĝia alteco estas pli granda ol la plej altaj statuoj el

tiuj de Jungang-kavernaro de la urbo Datong, Ŝanŝji-provinco, kaj Longmen-kavernaro de la urbo Lŭojang, Henan-provinco. Laŭ esploro de historiistoj, la regantoj de Tang-dinastio adoris budhismon, kio atingis la kulminon dum la regado de imperiestrino U Zetjan (684-704 p.K. sur la trono). La budhostatuo eble tiam konstruiĝis. Ĝia delikata kaj bela aspekto jam fariĝis simbolo de Sumeru-monto.

En la frutempaj kavernoj ankoraŭ konserviĝas ŝtonaj surskriboj kaj steleoj de la tibeta nacieco kaj la Okcidenta Ŝja-dinastio. Ili estas gravaj historiaj materialoj por esplori pri la aktivado de la nacimalplimulto en tiu regiono.

TRAFIKO SUR LA ALTEBENAĴO

de ŬAN ŬENJU


Tibeto, fama kiel tegmento de la mondo, havas multajn altajn montarojn kaj torentajn riverojn, kiuj malhelpis la tiean trafikon kaj izoligis ĝin for de la najbaraj provincoj Siĉŭan, Ĉinghaj kaj Ŝingĵang. En la pasintaj pli ol mil jaroj la tibetanoj kun firma volo elhakis kvin antikvajn komercajn vojojn kun Lhasa kiel la centro, kiuj kondukis al Ĉengdu, Ŝjining, Tarim-baseno k.a. Sed antaŭ la paca liberiĝo de Tibeto ĉi tie estis nek aŭtoj, nek aŭtovojoj. Oni transportis varojn per homforto aŭ ŝarĝbruto. La transportado de Lhasa al Ja'an en Siĉŭan per gruntbovoj bezonis duonjaron. Ankaŭ tiu de Lhasa ĝis Lhaze, tra Ŝigaze, bezonis ĉ. du monatojn.

En 1950 la trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo enirintaj en Tibeton, kune kun la tibetaj

Damŝjun-gubernio ĉe la Ĉinghaj-Tibeta Ŝoseo ĉiujare okazigas varo-interŝanĝan foiron, dume laborantoj de la gubernia registaro oficas sur stepo por servi al paŝtistoj.

popolanoj, komencis konstrui la Siĉŭan-Tibetan kaj Ĉinghaj-Tibetan Ŝoseojn. La antaŭa 2 413 kilometroj longa serpentumas de Siĉŭan-baseno al la Tibeta Altebenaĵo, transpasante 14 montojn altajn je 3 200 — 5 000 m. super la marnivelo, dekelkajn torentajn riverojn kaj regionojn minacatajn de sennombraj terŝoviĝoj kaj kotŝtonaj fluoj. Estas multaj altaj montoj tutjare neĝkovritaj kun glaciiginta grundo pli ol unu metron dika, kiun oni ne povas pioĉi, nek dinamiti. Dum konstruado de la ŝoseo en Ĉola-monto miloj da laboristoj kaj militistoj de ĈPLA transportis hejtajon de loko pli ol dek km. malproksima, por degeligi la glaciigintan grundon kaj faciligi la konstruadon. Ili laboris 50 tagojn por konstrui vojon 20 km. longan sur glaciiginta grundo.

Foto de DING ĜJUN



Laŭ nekompleta statistiko, la kvanto de la elfositaj teroj kaj roko dum la konstruado de la Siĉŭan-Tibeta Ŝoseo atingis pli ol 29 000 000 kubmetrojn, kio egalas al la tero elfosita de granda kanalo 15 metrojn larĝa, 650 km. longa kaj ĉirkaŭ 3 metrojn profunda. La Ĉinghaj-Tibeta Ŝoseo estas meznombre alta 4 500 m. super la marnivelo. La pasejo de Tanggula-montaro, kiun trapasas la ŝoseo, altas je 5 300 metroj. Survoje la aero estas maldensa, vetero kaprica, la ŝoseo devas trapasi frostan regionon kaj kotan stepon, etenditajn centojn da kilometroj. La projektistoj de la ŝoseo esploris kun helpo de kameloj tri jarojn, trairinte vojon de 5 000 km., kaj fine trovis tiun ĉi kompare idealan vojlinion. Tiuj du ŝoseoj trairantaj la "mondan tegmenton" estis samtempe transdonitaj al trafiko la 25-an de decembro, 1954.

Pasis nur 31 jaroj, multe ŝanĝiĝis la trafika fizionomio sur la altebenaĵo kaj ĝiaj multaj lokoj ekhavis ŝoseon. La ŝoseoj de la regiono atingis 21 500 km. kun 721 pontoj. La Ĉinghaj-Tibeta, Siĉŭan-Tibeta, Ŝingĵang-Tibeta kaj Junnan-Tibeta Ŝoseoj kunligas Tibeton kun la kvar regionoj. La Ĉina-Nepala Ŝoseo faciligis la trafikon inter Ĉinio kaj la Reĝlando de Nepalo. Post la finkonstruo de kvar trunkaj ŝoseoj, la tibetaj gubernioj kaj distriktoj per siaj propraj fortoj konstruis 315 branĉajn ŝoseojn kun totala longeco de 10 000 km., kaj tiel for-

miĝis ŝosea reto kun Lhasa kiel la centro. Nun 76 gubernioj kaj 442 distriktoj en la regiono, escepte de unu gubernio kaj 81 distriktoj, havas aŭtovojojn. En la lastaj jaroj la loka registaro de Tibeto investis 160 milionojn da ĵuanoj (ĉ. tri ĵuanoj egalas unu usonan dolaron) por konstrui novajn ŝoseojn, pontojn kaj reformi la malnovajn. La ŝoseo de Gonggara Flughaveno ĝis Lhasa jam estis asfaltita. En 1985 asfaltiĝis la 1937-kilometra Ĉinghaj-Tibeta Ŝoseo inter Lhasa kaj Ŝjining, la ĉefurbo de Ĉinghaj-provinco, kio pliigis ĝian transportan povon.

Kun la disvolviĝo de ŝosea konstruado nun la regiono jam havas sufiĉe grandan teknikistan trupon pri ŝosea trafiko. En 1954, kiam Ĉinghaj-Tibeta Ŝoseo kaj Siĉŭan-Tibeta Ŝoseo estis transdonitaj al trafiko, 700 ŝoforoj venintaj de diversaj lokoj de la lando malrapide veturigis ĉiusian aŭton en la urbon Lhasa, kio vekis sensacion ĉe la antikva urbo sur la altebenaĵo. Hodiaŭ la regiono jam posedas 16 000 diversstipajn aŭtojn kaj 20 000 ŝoforojn, kies 60 procentoj estas tibetanoj. Estas pli ĝojiga afero, ke dank' al la praktikado de la politiko "malfermi la pordon al la eksterlandoj kaj vigligi la ekonomion enlande" en la lastaj du jaroj ĉ. mil kamparanoj kaj paŝtistoj ekokupiĝis pri transportado. Ili formis neneglekteblajn fortojn en la trafiko. La Tibeta Aŭtomobila Riparejo, establita en 1956, riparas aŭtomobilojn en la regiono. Tibeto havas ankaŭ siajn trafik-sciencan instituton, esplor-projektan instituton kaj trafikalan mezlernejon.

Ĉ. dekmil vojprotektistoj fleugas la ŝoseojn. Naturaj katastrofoj, kiaj lavango, glacia rivero,



Aŭtoj sekure veturas sur la Ĉinghaj-Tibeta Ŝoseo.

Foto de CAJ LONG

terfalo kaj kotŝtona fluo ofte okazas en Tibeto, kio grave minacas la trafikalan sekurecon kaj kaŭzas grandan perdon. La Siĉŭan-Tibeta Ŝoseo estas ofte minacata de kotŝtona fluo je centoj da kilometroj. Ie kotŝtona fluo okazas 30-40-foje en unu jaro. La kvanto de kotŝtona fluo unufoje povas atingi 10 milionojn da kubmetroj, kio detruas vojon kaj pontojn kaj malhelpas normalan trafikon. Ĝuste tiuj senfamaj herooj gardas la ŝoseojn ĉe 700 danĝeraj lokoj, tutjare vivante sur la senhomaj montoj por senprokraste batali kontraŭ la katastrofo, kaj protekti la vojon kaj teni la trafikon ĉiam en sekureco.

La rapide disvolviĝanta trafiko alportis senprecedencan prosperon al la ekonomio kaj kulturo de Tibeto. Ŝigaze, grava urbo de la malantaŭa Tibeto, antaŭe havis nek fabrikan, nek kompare bonkvalitan straton, nek etaĝdomon. Ĝiaj eduka kaj kultura aferoj estis tre postiĝintaj. Kun la trafika prosperiĝo ĉi tie aperis ledfabriko, gren- kaj ole-prilaborejoj, manĝaj-prilaborejoj kaj aŭta kaj agrikulturila riparejoj. En la urbo oni konstruis hotelojn, hospitalojn kaj magazenojn, ekfunkciigis lernejojn, kinejojn kaj TV-stacion. Nun Ŝigaze vere fariĝis la dua fama urbo de Tibeto. Antaŭ dek jaroj Ŝuanhu



Dank' al facila trafiko de ŝoseo tibetanoj povas aĉeti ĉiutagajn necesajn produktitajn de malproksimaj urboj.

estis ankoraŭ "senhoma loko". Hodiaŭ de tie oni povas veturi al Nagĉju, Amdo kaj Ŝainza per aŭto, la distriktoj kaj subdistriktoj jam estas interligitaj per aŭtoŝoseoj. Antaŭ la fino de 1984 tie la totala nombro de la bredataj brutoj atingis 630 000, meznombre ĉiu loĝanto posedis 70 brutojn kaj enspezis 607 jŭanojn jare. Ŝuanhu fariĝis nova brutprodukta bazloko de Nagĉju.

La konstruado de Tibeto evidente rapidiĝis en la lastaj kvar kvin jaroj. La kvanto de varoj kaj materialoj enportitaj de la landinterno en Tibeton kreskas ĉiujare. Tiu en 1983 atingis 275 000 tunojn, t.e. 8.8-oblon de tiu de 1959. En 1984 oni komencis 43 gravajn konstruojn helpate de aliaj landpartoj. Tio estis senprecedenca por Tibeto ĉu en kvanto aŭ skalo kaj faris la transportan taskon pli peza. Subtenate de aliaj lokoj kaj la Popola Liberiga Armeo, la trafika departemento de Tibeto enportis varojn kaj materialojn de pli ol 500 000 tunoj en 1984, duoble kiom en 1983 kaj garantiis la sukcesan plenumiĝon de la gravaj konstruoj.

Foto de CAJ LONG


90% de la ĉiutagaj bezonaĵoj kaj almanĝaĵoj de la tibetanoj estas enportitaj de la landinterno. La varoj vendataj en Lhasa, Ŝigaze, Ĉamdo kaj aliaj lokoj estas tre abundaj kaj atingis ĉ. 7 000 speciojn. Teo, sukero, tabako, alkoholaĵo, magnetofonoj, kudromaŝinoj, bicikloj k.a. ĉie estas aĉetebraj en vendejoj urbaj kaj kamparaj. Kaj plie la prezoj estas stabilaj. La ŝafaj lano kaj feloj, kaj altvaloraj drogoj, kiaj raŭpaj fungoj (*Cordyceps sinensis*, fritilariaj bulboj vendiĝis al la landinterno. En la lastaj jaroj la pasaĝera trafiko multe pro-


gresis. La subregionoj Ŝannan, Nagĉju, Ŝigaze, Ĉamdo kaj la urbo Lhasa ekfunkciigis lokajn pasaĝer-trafikajn liniojn.

En 1956 pilotoj de la popola aera mezo kreis miraklon en la ĉina aviada historio, malferminte aerlinion inter Pekino kaj Lhasa. Samjare grandtipa civila aviadilo sukcese provflugis sur la linio de Pekino — Ĉengdu — Lhasa. En la sepdekaj jaroj malfermiĝis la aerlinioj de Langou — Lhasa kaj Ŝji'an — Lhasa. Nun la du aerlinioj de Lhasa — Ĉengdu — Pekino kaj Lhasa — Ŝji'an bone servas al la pasaĝeroj.

De 1984 la popola registaro de la Tibeta Aŭtonoma Regiono faras intensan laboron por ripari kaj reformi ŝoseojn por altigi la transportan kapablon. Aliflanke, ĝi subtenas kaj disvolvas privatajn trafikajn entreprenojn. Antaŭ la fino de 1984 tibetanoj jam aĉetis ĉ. mil aŭtojn. Sur la rivero Jarlung Zangbo de la subregiono Ŝannan reaperis bovledaj boatoj por transportado. Nun jam estas 3 000 familioj speciale sin okupintaj pri transportado. Nun en la urbo Lhasa kuras taksioj. Iom post iom perfektigas la trafika reto aera, tera kaj surakva kun ŝtataj aer- kaj ŝose-trafikaj entreprenoj kiel la ĉefaj kaj privataj entreprenoj kiel akcesoraj.

Fairo en paŝta regiono





Ponto de ŝoseo kondukanta al Lhasa

Foto de MA ĜINGCIŬ

Ŝoseo sur la Tibeta Altebenaĵo





Flughaveno de Gonggar apud Lhasa

Foto de **ŠJU PENG**



La Siĉŭan-Tibeta Ŝoseo sur altebenaĵo, kiun la tibetanoj nomas "ora ponto"

Foto de **KANG SONG**






Plibonigo de la Ĉinghaj-Tibeta Ŝoseo

Foto de CAJ LONG

*72-kurbiĝa ŝoseo ĉe pasejo de Jeta-montaro 4 616
metrojn alta en orienta Tibeto*






EL REALA VIVO DE ĈINIO

Festado

Kun drako-lanterno



*Festaj vortoj sur pordo de
kampana domo*



LA TRADICIA PRINTEMPA FESTO EN ĈINIO

Fotoj de ĜJI JAN

Mi pasigis miajn infanajn jarojn en kamparo de norda Ĉinio. Tuj kiam mi vidis grandan vintran neĝon, mi ekpensis pri la festo. Tiam mi ŝatis kanti: "Agrabla festo, agrabla festo. Ĉiuj en novaj vestoj, en novaj ĉapeloj, ĝuas pasteĉojn, krakigas petardojn, baniĝas en senfina gajeco."

La festo laŭ la luna kalendaro venas ĝenerale en februaro de la Gregoria kalendaro. Kaj tiun feston la ĉinoj nomas la Printempa Festo, kiu estas tradicia festo de la ĉina popolo. Laŭ la difino de la ŝtato, oni ferias la unuan, duan kaj trian tagojn de la unua monato de la luna kalendaro kaj ricevas laborpagon senescepte. Dum la festo la tuta lando estas iluminita. Oni okazigas diversajn aktivadojn kun lokaj moroj. Ĉiuj urboj kaj vilaĝoj dronas en festa ĝojo.

Antaŭ la festo ĉiuj familioj purigas aŭ kalkas siajn domojn, aĉetas festajn necesaĵojn aŭ buĉas porkojn kaj ŝafojn. Oni algluas al pordo ruĝajn paperojn kun bonaŭguraj versparoj por adiaŭi la malnovan kaj renkonti la novan. Antaŭvespere de la Printempa Festo ĉiu familio sidas ĉirkaŭ tablo abunda je vinoj kaj manĝaĵoj. La infanoj lumigas lanternojn, eksplodigas fajraĵojn aŭ ludas kelkope. Gaja ridado kaj krakado de petardoj daŭras ĝis la mateno. En la unua tago de la unua monato oni benas unu alian ĉe renkontiĝo. Tio statas tri sinsekvajn tagojn kaj eĉ duonmonaton en iuj lokoj.

Post la festo degelas la riveroj kaj verdas la arboj. Kaj oni komencas sian novan laboron.

Draka danco





Infanoj ĝuantaj lanternojn



Vilaĝa strato en la festo





Leonludo

Prezentado sur stilzoj

"Bonvenigo de novedzino sur azeno"



Humura dialogo



KANTO DE LA KVAR SEZONOJ

(Novelo)

I

Junulo kaj junulino estis promenantaj en parko.

Estis printempa vespero.

Vespero kaj printempo humidigis la parkon de la nordo, kaj la tero sub la piedoj vaporis per amareta kaj adstringaodoro.

La junulino serĉis vakan benkon per la okuloj, sed ne trovis, ĉar ĉiuj benkoj estis okupataj de gejunuloj.

Ŝi ofte venis en la parkon en sia infaneco kaj ankaŭ kiam ŝi lernis en mezlernejo. Tiam ŝi tute ne atentis benkojn kaj la sidantojn. Ŝi ŝatis rigardi fiŝojn, florojn, arbojn, simiojn, pavojn. Hodiaŭ ŝi unufoje volis okupi vakan benkon en kvietangulo de la parko. Kaj ĉe tio ŝi konsciis, ke ŝi enamiĝis.

Subite la junulo ekkuris — ne malproksime estis vaka benko. Li atingis la benkon unu paŝon pli frue ol alia paro da geamantoj. Li mansvingis al ŝi, kaj tiu ekkuretis ĝojante pro lia spriteco.

La benko estis metita en tre taŭga loko: ĝi superstaris la malgrandan deklivon apud la vojeto. Sidante sur la benko, oni povis superrigardi la vojeton; post la benko kreskis malalta plorsaliko, kiu povis kaŝi ilin.

Ili ambaŭ sidiĝis.

La junulo prenis el la poŝo saketon da konfititaj abrikotoj kaj donis ĝin al la junulino. Ŝi

ruĝetiĝis kaj demandis: “Kiel vi sciigis, ke mi ŝatas konfititajn abrikotojn?”

“Ĉion mi scias pri vi.”

“Tamen ni interkonatiĝis antaŭ nur dek tagoj.”

“Dek tagoj? Jes. Sed inter ‘sciigo’ kaj ‘dek tagoj’ ne estas nepre interligiteco.”

“Sed dek tagoj ja markas tempon.”

“Kion tempo povas pruvi? Iujn homojn vi neniam povas bone koni, eĉ se vi kunestas kun ili dum duono de vivdaŭro, ĉar vi povas interparoli kun ili nur sur la sama nivelo; dum iujn aliajn vi povas kompreni tuj je ekrigardo. Ekzemple, mi sentas, ke ŝajne mi konatiĝis kun vi antaŭ tre tre longa tempo. Mi eĉ sentas, ke la dio kreis vin ĝuste pro tio, ke en la mondo ekzistas mi. Kvankam vastega estas la maro de homoj, tamen ni certe konatiĝos unu kun la alia. . .”

“Jes, jes. . . finfine ni renkontis unu la alian,” diris ŝi murmure.

Kvazaŭ ŝi ne aŭdis klare, kion li diris, kaj ne komprenis, kion diras ŝi mem; ŝi sentis nur ian eksciton. Lia basa voĉo ĉirkaŭvolvis ŝin kiel varmaj fluoj. Ŝi sentis varmon en la koro, tamen ŝia korpo tremis de tempo al tempo. Ŝi forte kunpremis la dentojn por rezisti la tremadon, timeme atendente novan momenton.

Sed sur la benko ne aperis tiu

momento, la junulo ŝanĝis la paroltemon.

Subite ŝi volis plori.

Kiam la nokta kurteno vualis ilian rigardon, ŝi turnis al li la okulojn kaj tuj sentis fortan batadon de la koro ĉe la vido de lia ĉarma profilo.

“Ĉu vi vidas min?”

“Jes.”

Li premis al ŝi la manon. Ŝi rememoris la verson: “Ŝi prodiĝis sian someron jam en majo.” Ŝi ne premis al li la manon.

II

La junulo kaj la junulino estis promenantaj en la parko.

Estis somera vespero.

Estis kviete ĉirkaŭe. Proksime nur maljuna florkulturisto kurbiĝe laboris apud la malalta heĝo.

Ili sidiĝis en la antaŭa loko kaj kondutis ne alie, ol plejparto de la enamiĝintaj gejunuloj, kiuj de longe bone konas unu la alian.

Kiam la nokta kurteno nebulegis ilian rigardon, la junulino kaptis al li la manojn, dirante: “Mi volus diri ion al vi.”

Li liberigis unu el la manoj kaj per ĝi karesis al ŝi la mandorson.

“Antaŭe mi amis iun,” ŝi diris.

“Oj,” li pene ŝajnis sin indiferenta pri tio, “kiam?”

“Kiam mi havis dek du jarojn.”

Li ekridis en la mallumo.

“Li estis nia grupestro. Foje dum tri tagoj li ne venis al la lernejo pro malsano, kaj mi skribis al li.”

“Kion vi skribis?” en lia voĉo sentebliis ĝojo.

“Nu, mi skribis, ke li bone ripozu, ke ni sopiras lin. Fakte nur mi sopiris lin.”

“Kio li estas nun?”

“Lokomotivisto. Lia edzino estis nia ĉeflernanto pri la kurso de la ĉina lingvo.”

Li firme brakumis ŝin kun granda ĝojo.

“Dolore!” ŝi diris.

“Kiel mi amas vin!” li murmuris al ŝia orelo.

“Por kio? Por kio...” Ŝi konsternite demandis kiel kutime.

“Ĝuste por tio,” li kisis ŝian ĉarman ŝultron.

Lia koro bolis de feliĉo, tikliĝis de la plena amo kaj ankaŭ de ŝia elvokiva rakonto. Ĉu en la mondo troviĝus tia viro, kiu ne volas havi tian edzinon? Li bedaŭris, kial li ne rakontis al ŝi pri sia pasintaĵo pli frue ol ŝi. Ankaŭ li havis ion por diri al ŝi.

“Ankaŭ mi volus diri ion al vi.”

“Ne diru, ĝin mi bone scias,” ŝi ŝtopis al li la buŝon per la mano.

“Kion vi scias?” li formovis la manon.

“Ĉion mi scias,” ŝi diris kviete.

III

La junulo kaj la junulino estis promenantaj en la parko.

Estis fruaŭtuna vespero.

La junulo rakontis al la junulino pri sia pasintaĵo kaj pri sia antaŭa amatino. Li insistis, ke ŝi sciu pri lia pasintaĵo, por ke ŝi

kredu, ke li malestimas kaj abomenas la pasintecon, ke li amas nur la nunan “ŝi”.

“Tiam mi laboris en la kamparo kaj en la monotona kaj terure enuiga vivo mi eksoifis amon. Ŝi estis entuziasma kaj pasia, ofte vizitis min, kion mi neniel povis rifuzi. Mi dankis ĉion kion ŝi donis al mi. Tiutempe, pro ŝia kunestado, mi sentis, kvazaŭ la tero fariĝus brila. Kaj nur hodiaŭ mi komprenas, ke dankemo estas la plej malfidinda sento.”

“Jes, malfidinda,” samopiniis la junulino.

“Poste, ŝi forlasis min kaj havigis al si laboron en la urbo. Ŝi edziniĝis al filo de vicurbestro, kiu donis al ŝi la laboron. Tiutempe profesio estis multe pli alloga ol amo.”

“Jes, multe pli,” samopiniis la junulino.

“Rememorante ĉion ĉi, mi opinias, kiom gratulinda mi estas; estas feliĉe, ke ŝi disiĝis de mi, alie mi ne povus konatiĝi kun vi. Vi certe ne scias, ke ŝi estas tute alispeca virino. Ŝi estas tro postulema je viro. En la vilaĝo ŝi ĉiam devigis min senĉese kisi ŝin, kaj cetere, ofte postulis de mi aĉeti por ŝi arakidojn, sekajn persimonojn kaj eĉ saŭcon. Ĉu alia virino povus esti tiel ne memrespekta kiel ŝi?...”

“Jes, kiel ŝi povis tiel...” la junulino nerimarkite faris distancon inter si kaj la junulo kaj sidis sur la alia ekstremo de la benko.

“Unuvorte, ŝi estas neniel komparebla kun vi. Ŝiaj gamboj estas ne mallongaj, sed la maldekstra estas iom kurba, dum la viaj estas sveltaj kaj rektaj, malofte videblaj. Malofte videblaj, ĉu vi komprenas?”



“Ĉu vi komprenas?” murmure ripetis la junulino.

Antaŭ ŝiaj okuloj aperis nebuloj kaj floroj. Ŝi senkonscie forlasis la benkon kaj venis al florbedo.

La junulo venis al ŝi. Ŝi tamen iris plu antaŭen.

Ŝi haltis antaŭ bedo de trikoloraj violoj.

La junulo daŭrigis sian rakonton starante post la junulino: "Mi konfesas, ke mi ĉirkaŭprenis ŝin. Tamen mi nepre devas diri al vi, ke dum ĉirkaŭpreno mi sentis, ke ŝia brusto estas tro grasa. Ŝi virgulino, sed. . . mi eĉ suspektis, ke ŝi. . . Ĉiuokaze tiuspeca virino estas timinda. Poste mi ofte sentis naŭzon pri ŝi."

"Jes, naŭzon. . ." la junulino fiksas la rigardon sur la trikoloraj violoj. Similaj al la vizaĝoj de maljunuloj, la violoj faris grimacojn al la junulo kaj la junulino. La junulino deturnis la rigardon.

La junulo iris antaŭ la junulino, dirante: "Kredu min, kredu, ke mi amas nur vin. Mi konfesas mian ĉion ĝuste pro mia amo al vi."

"Jes, ĉion," diris la junulino. Li sentis ŝian voĉon tre stranga kaj ankaŭ iom ofendita.

IV

La junulo kaj la junulino estis promenantaj en la parko.

Estis vintra tagmezo.

Kaŝiĝis la suno. Neĝis.

Ilia kutima loko estis vaka.

La junulo alkuris, forbatis per la ledgantoj la neĝon sur la benko kaj mansvingis al la junulino, sed ŝi ne haltis.

La junulo tuj forlasis la benkon kaj kuris al ŝi.

"Mi ne komprenas, kial vi. . ." li demandis.

"Mi pensas pri mia frato," respondis la junulino.

"Mia frato estis iam trafita de granda malfeliĉo. Miaj frato kaj bofratino vivis en malharmonio. Foje ili kverelis, kaj ŝi rompis al li la mezan fingron de la dekstra mano. Poste, ili eksedziĝis."

"Kiel kruele, neimageble," mallaŭte diris la junulo.

"Nun mi havas novan bofratino. Mia frato ne permesas al ni rakonti al ŝi la pasintaĵon." "Ankaŭ li mem ne. . . ?"

"Li neniam rakontas al aliaj pri sia pasinta malfeliĉo. Mi koleriĝis kaj demandis lin pri la kialo, kaj li diris, ke ŝi devas havi sian propran vivon kaj. . . estontecon."

Haltinte la junulino daŭrigis: "De tiam mi ekkomprenis, kio estas viro."

La junulo per senmovaj okuloj rigardis ŝin. Li ne nur trovis, ke ŝiaj delikataj ŝultroj estas tre ĉarmaj, sed ankaŭ vidis en ŝi detenan forton, kiun li rimarkis neniam antaŭe.

La junulino daŭrigis sian iradon, dum la junulo haltis. Irante la junulino pensis en si, kion ŝi havas en si por ke li priskribu al aliaj. Irante ŝi viŝis al si per mandorso la okulharojn vuallitajn de larmoj kaj neĝeroj.

Elirinte el la parko, ŝi trovis ĝian pordon.

(Esperantigis Ŭang Ŝijong)

* La aŭtorino 29-jara laboras en la Literatura kaj Arta Federacio de Baŭding, Hebej-provinco. Ŝi verkis la novelaron "Vojirado en Nokto". Ŝia novelo "Ho, Aroma Neĝo" estis premiita kiel eminenta novelo de 1982 kaj publikigita kun la titolo "Kiam la trajno haltas ĉi tie. . ." en la sesa numero de nia gazeto en 1983.

POR VIA SANO

OK SANIGAJ EKZERCOJ (I)

Antikvaj ĉinoj komparis siajn sanigajn ekzercojn kun okulplaĉa kaj bunta brokato. La ekzercaro konsistas el 8 pecoj, tial oni nomas ĝin "okparta brokato".

La "okparta brokato" dividiĝas en la ekzercojn sidajn kaj starajn. Ĉi sube ni konigos al vi la sidajn ekzercojn, kiuj karak-

teriziĝas ĉefe per masaĝo. Ekde ĉi numero ni publikigos ilin en ĉiu dua numero.

Dum ekzercado vi devas atenti pri jenaj punktoj:

TENIĜO

Ĝeneral-dire, vi povas fari la ok sanigajn ekzercojn kuŝante sur

lito aŭ sidante sur seĝo. Pli bone vi faru la masaĝon nude ĉu sidante ĉu kuŝante. Tio rikoltas ne nur bonan efikon de masaĝo, sed ankaŭ de aerbano. Se vi ne povas adaptiĝi al malvarmo, vi do povas fari tion sub litkovrilo. Kvankam iuj ekzercoj estas malfacile fareblaj tiukaze, tamen la masaĝo

alportas iagradan utilon al la sano.

Masaĝante la kapon, vi devas kuŝi surdorse kun kapo levita. Antaŭ ol froti la piedkavojn vi devas surmeti veston kaj leviĝi. Kiam vi frotas ambaŭ flankojn de la lumbaj vertebro, vi devas kuŝi surflanke de la korpo kaj froti per la manoj alterne.

KONSCIO

Sidiĝinte aŭ kuŝiĝinte, vi devas tuj vin liberigi de ĉia distriĝemo, sen aŭskultado kaj rigardado foren, malstreĉi vin kaj turni vian atenton ekskluzive al la umbiliko, ĉar la ĉinaj medicinistoj opinias, ke ĉirkaŭ la umbiliko produktiĝas la vitala forto de la homo. Farante masaĝon kaj movojn, vi povas iom atenti pri movo kaj spiro.

SPIRADO

Bone reguliginte viajn teniĝon kaj konscion, vi povas kelkfoje profunde kaj nature spiri per la abdomeno.

Estas du specoj de la spirado per la abdomeno: A. Dum enspiro la abdomeno malleviĝas kaj la brusto leviĝas. B. Dum enspiro la abdomeno leviĝas kaj la brusto iom leviĝas kaj dum elspiro la abdomeno malleviĝas. Farante la ekzercojn, vi povas uzi la unuan aŭ la duan, tamen ĉe la komenco estas pli bone miksuzi naturan profundan spiron per la brusto kaj la abdomeno.

Vi devas senspiri per la nazo, lekante la supran makzelon, kaj elspiri per la buŝo, mallevinte la langon. Faru la samon 8-9 fojojn. La spirado devas esti milda, longa kaj natura.

Komence vi povas spiri 3-5 fojojn kaj poste iom post iom pliigi la fojojn. Vi povas fari pliajn tri fojojn ĉiutage, por ke la

fojoj iom post iom atingu 20-30 en la ĉiufoja ekzercado. Sed vi nepre devas fari tion laŭ via sanstato kaj iom post iom efektiviĝi vian celon. Precipe, la homoj malfortaj kaj malsanemaj devas esti pli singardemaj dum la ekzercado, ĉar alie la drasta movado de la diafragmo povas damaĝi la internaĵojn.

Vi devas fari la spiradon en ĉambro kun freŝa aero. Se mankas freŝa aero en ĝi, vi povas unue fari la ok sanigajn ekzercojn, kaj poste la spiradon en loko kun freŝa aero.

Farante la "ok-pecan brokaton" sur lito, vi devas spiri nature de la komenco ĝis la fino.

Netaŭgaj spirado, teniĝo kaj konscio povas rezultigi malbonajn reakciojn. Ekz., la tro forta kaj profunda spirado povas kaŭzi kapturteniĝon, kappeziĝon, kapdoloron, brustan premitecon aŭ doloron, abdomenan ŝveliĝon, maltrankvilon k. a. La tro longa spirhalto, tro profunda enspiro povas esti palpitation. Tamen tiuj fenomenoj povas esti preventitaj kaj forigitaj per reguligo de la teniĝo, spiraj maniero, profundeco kaj fojoj kaj konscio.

Ne faru la spiradon en malsato aŭ satego, en malbona humoro kaj post laciĝo. Ne faru tion, dum vi suferas de akuta abdomena malsano kaj akutaj infektoj de la spira kanalo, kiaj gripo, rinito, traĥeito, hemoptizo kaj pulmito.

Fininte la ekzercon de spirado, vi devas froti viajn manojn unue kaj vian vizaĝon poste. Se vi hazarde sentas vin ne bone en la abdomeno, vi do devas delikate knedi vian tutan abdomenon kelkfoje per la manplato kaj poste malrapide stariĝi, movi la membrojn aŭ trinki iom da varmeta akvo.

MOVO

I. Frotado

La fratado povas akceli sango-cirkuladon de la tuta korpo, plibonigi sangoprovizon de la visceroj, helpi al la peristalta movado de la stomako kaj intestoj, ekzerci membrajn muskolojn kaj artikajn funkciojn kaj plifortigi metabolon, haŭtan elastecon, funkciojn de ŝvitaj kaj sebumaj glandoj kaj la haŭtan povon kontraŭ frosto kaj infekto, tio ebligas al la muskoloj de la ekzercanto ne malstreĉiĝi eĉ en lia maljuneco. La frotado ankaŭ povas stimuli la sensajn nervajn ekstremojn kaj estigi mildan stimulon al la nerva sistemo, tial post la ekzercado vi sentas refreŝecon kaj komfortecon. Se vi faras tion antaŭ vespera dormo, tio utilas al elimino de laciĝo.

Ĝenerale vi frotas la tutan korpon per la manoj. Se vi multe ŝvitas, kutimas dormi en piĝamo aŭ havas kalojn surmane, kio malhelpas la frotadon, vi povas anstataŭe vin frapeti, knedi muskolojn ktp, ankaŭ tio povas rikolti bonan efikon.

A. Manfrotado. Frotu la manojn ĝis varmiĝo. Forte premu la dekstran mandorson per la maldekstra kaj forte frotu ĝin kaj inverse faru la samon. Tiel faru pli ol dek fojojn ĝis varmiĝo. (Bildo 1)

La manfrotado povas akceli sangan cirkuladon de la manoj kaj lertigi la fingrojn, kio utilas al la funkciado de *ĝinglŭo*-vojoj (*ĝinglŭo*-oj, laŭ la ĉin-medicina teorio, estas vojoj, tra kiuj cirkulas la esenca energio de la homo kaj laŭ kiuj lokiĝas ĉiuj akupunkturaj punktoj).

Serioza kaj persista frotado de la manoj estas utila al kuracado de la fingraj sensentemo kaj malvarmo de maljunulo, al refunk-

ciado de paralizita mano kaj al prevento kaj kuraco de mana frostŝvelaĵo. Se vi forte pugnigas la manojn 19-20-foje post manfrotado, la efiko estas pli bona.

Post frotado de la mandorsoj froti la mankavojn ĝis varmiĝo estas utile por dormo.

B. Brakfrotado. Forte premu la internan flankon de la maldekstra pojno per la dekstra manplato kaj forte frotu la internan flankon de la brako ĝis la ŝultro: movu la platon trans la ŝultron kaj frotu la eksteran flankon de la brako ĝis la maldekstra mandorso. Tion ripetu dekkelkajn fojojn. (Bildoj 2 k 3). Poste, en la sama maniero frotu la dekstran brakon per la maldekstra manplato dekkelkajn fojojn (en unu fojo necesas fini froti la internan kaj eksteran flankojn de la brako).

La brako havas tri gravajn artikojn ĉe *ĝinglŭo*-vojo. Ilia nenormala funkcio, kvankam malforta, influas la tutan korpon. La brakfrotado utilas al la artikaj funkcioj, preventado de artikito kaj ŝultro-doloro kaj al la cirkulado de *ĝinglŭo*-vojoj.

Se la suferantoj de braka doloro kaŭzita de malvarmo faras la frotadon ankoraŭ dekojn kaj eĉ centojn da fojoj, tio rezultigas bonan efikon. Tamen tiuj, kiuj suferas de braka ŝveliĝo kaŭzita

de inflamo, ne devas fari la ekzercon.

C. Kapfrotado. Premu la frunton per la mankavoj kaj iom forte frotu la vizaĝon tra la nazo ĝis la mentono, frotu tra la mentono malantaŭen la okcipiton ĝis supre de la oreloj kaj malforte frotu la kranion ĝis la frunto. Faru la samon dekkelkajn fojojn. (Bildoj 4 k 5)

Sekve, per la dek fingropintoj aŭ ungoj egalforte knedu la harradikojn 10-20-foje kaj prempu la dikfingrojn de la tempioj al la verto, samtempe puŝu la aliajn fingrojn. Kunmetu la kvin fingrojn ĉe la verto kaj prempu ilin ĝis la nuko. Atentu, ke vi prempu ĉiam forte la dikfingrojn, kaj ne la aliajn fingrojn. Faru la samon dekkelkajn fojojn, kio utilas al malaltigo de sangopremo. La gravaj suferantoj de hipertensio povas fari la frotadon 30-70-foje. (Bildoj 6,7 k 8)

La frotado povas akceli ne nur la sangocirkuladon de la vizaĝo kaj kapo, sed ankaŭ la sangoprovizion de la cerbo kaj ties nervosistemo, kaj plifortigi ilian funkcion. Tial la ekzercanto de tiu frotado havas sanan vizaĝon senfaltan eĉ en sia maljuneco.

Malforte kaj egalforte pinĉi kaj premi la tutan kapon per la un-

gopintoj povas akiri iagradan efikon de kapa akupunkturado. Laŭ la teorio pri funkcioj de diferencaj partoj de la cerba kortiko, la persista kap-frotado bone efikas sur kuracadon de membra paralizo, sensentemon, anormalan estezon, perturbon en la vidkapablo kaj afazion, kaŭzitajn de cerbaj malsanoj.

Forte frotu la tempiojn per la du dikfingroj, kio utilas al kuracado de migreno, paralizo de la vizaĝaj nervoj.

Forte frotu la tempiojn per la dikfingroj kaj samtempe frotu la kapon kaj nukon per la aliaj fingroj, kaj interalie masaĝu ankaŭ la akupunkturajn punktojn *fengĉi* kaj *daĝuj* kaj la nukon. La masaĝo de *fengĉi* bone efikas sur malaltigon de sangopremo kaj preventon de doloro en la posta kapo. La masaĝo de *daĝuj* bone efikas sur kuracadon de dorsa kaj kola doloro kaj ankaŭ sur senfebrigon kaj seninflamigon. La masaĝo de la eksteraj flankoj de la kolo (precipe la kolaj arterioj) akcelas la sangoprovizion de la cerbo kaj kuracas la cerban anemion kaj hipertension.

Estas tre malmultaj, kiuj sentas kapturniĝon post kapfrotado, tiam ili devas ĉesigi la frotadon.

(Daŭrigota)



Bildo 1

Bildo 2

Bildo 3


Bildo 4

Bildo 5

Bildo 6

Bildo 7

Bildo 8



Kun renversita gorilo



La aktoroj irantaj al ludejo

POLA AKROBATA TRUPO EN PEKINO

Novembre de 1985 42-membra pola akrobata trupo vojaĝis kaj ludis en Pekino. La pola akrobatiko havas longan historion. Jam en la 19-a jarcento en Pollando estis profesia akrobata trupo. Nun Pollando havas ok migrajn akrobatajn trupojn kaj unu cirkon, kiu troviĝas en Varsovio. Kaj la menciita akrobata trupo estas unu el la plej elstaraj en Pollando. Mul-

taj el ĝiaj aktoroj ludis en Usono, Kanado, Japanio, Jugoslavio, Ĉeĥoslovakio kaj Hungario.

La pola akrobata trupo unuafoje estis en Ĉinio. Ĝiaj belaj akrobataĵoj, kiel aera trapezoludo kaj transkapiĝo malantaŭen sur stango, ricevis aplaŭdodon de ĉinaj rigardantoj.

Dum restado en Pekino la polaj

akrobatoj interŝanĝis spertojn kun ĉinaj kolegoj, kaj la artistoj de ambaŭ landoj improvizis prezentadon kaj reciprokis memoraĵojn.

Krome, la polaj artistoj ankaŭ vizitis la Grandan Muron, Dek Tri Maŭzoleojn de Ming-dinastio, Someran Palacon kaj Imperiestran Palacon en Pekino.

Bicikla akrobataĵo



Prezentado sur rulglitiloj



Svingo de rubando



第二十课 Dudeka Leciono

住宿 *Loĝo*

Ofte uzataj vortoj

我们住在哪里	wǒmen zhù zài nǎli	kie ni loĝos
你们几位住在西苑饭店	nǐmen jǐwèi zhù zài Xīyuàn Fàndiàn	vi loĝu en Ŝijūan-hotelo
西苑饭店在什么地方	Xīyuàn Fàndiàn zài shénme dìfang	kie troviĝas Ŝijūan-hotelo
北京西郊二里沟	Běijīng xījiāo Èrlīgōu	en Èrlīgōu, okcidenta antaŭurbo de Pekino
那里离市区远不远	nàli lí shìqū yuǎn bù yuǎn	ĉu la loko estas malproksime de la urbocentro
不太远	bù tài yuǎn	ne tre malproksime
太好了	tài hǎole	tre bone
不客气	bù kèqì	ne dankinde

Dialogo

A: 王先生, 请问我们被安排住在哪里?

B: 在北京西郊二里沟。

A: Wáng xiānsheng, qǐngwèn wǒmen bèi ānpái zhù zài nǎli?

B: Zài Běijīng xījiāo Èrlīgōu.

Ŭang sinjor-, bonvol- demand- ni est- arangê- loĝ- kie

en Pekin- okcident- antaŭurb- Èrlīgōu

B: Ĝi troviĝas en Èrlīgōu, okcidenta antaŭurbo de Pekino.

A: Pardonon, sinjoro Ŭang, kie oni loĝigas nin?

A: 那里离市区远不远?

A: Nàli lí shìqū yuǎn bù yuǎn?

B: 你们几位住在西苑饭店。

tie de urbocentr- malproksim- ne malproksim-

B: Nǐmen jǐwèi zhù zài Xīyuàn Fàndiàn. vi kelk- loĝ- en Ŝijūan hotel-

A: Ĉu la loko estas malproksime de la urbocentro?

B: Vi loĝu en Ŝijūan-hotelo.

A: 这个饭店在什么地方?

B: 不太远。交通也方便。

A: Zhège fàndiàn zài shénme dìfang? ĉi hotel- en kie

B: Bù tài yuǎn. Jiāotōng yě fāngbiàn.

A: Kie troviĝas tiu hotelo?

ne tre malproksim-, trafik- ankaŭ oportun-

- B: Ne tre malproksime. Kaj la trafiko estas oportuna. A: Tre bone. Dankon!
 A: 太好了。谢谢你们! B: 不客气。
 A: Tàì hǎole. Xièxie nǐmen! B: Bù kèqi.
 tre bon-. dank- vi ne dank-
 B: Ne dankinde.

Klarigoj:

1. 请问 estas ĝentila vorto. Por peti respondon de iu, oni devas unue diri 请问 kaj poste fari demandon por esprimi ĝentilecon aŭ respekton. Ekz. 请问大会在哪里开? (Pardonon, kie okazas la kongreso?)
2. 几位: 几 karakterizas nedifinan nombron, sed ne demandon.
3. 远不远: Oni povas fari demandan frazon kunmetante la jesan kaj nean formojn de iu verbo aŭ adjektivo. Ekz. 您回不回国? (Ĉu vi revenos al via patrolando aŭ ne?)
4. 不太远, 不太 + adjektivo aŭ verbo. Tiu formulo estas uzata por mildigi negacion. Ekz. 不太忙 estas pli milda ol 不忙.

ĈINLINGVA KURSO EN RADIO PEKINO

Diverslandaj esperantistoj venos al Ĉinio por ĉeesti la 71-an UK julie en Pekino. Por faciligi al ili la vojaĝon kaj aliajn aktivadojn en Ĉinio, la Esperanta Sekcio de Radio Pekino komencis elsendi ĉinlingvan kurson en januaro ĉi-jare laŭ la peto de aŭskultantoj kaj surbaze de lecionoj de "Ĉinlingva Kurso" publikigitaj en EPĈ kaj iom modifitaj.

Krome, Radio Pekino kaj nia redakcio eldonos la instrumaterialon kaj surbendigis ĝin por kontentigi niajn samideanojn.

BLUE GLAZURITA VAZO KUN

GRAVURITA

BLANKA DRAKO

La vazo 43.3 centimetrojn alta kun malgranda aperturo, mallonga kolo kaj ŝvela supra parto estas bela. Ĝi estis produktita de Ĝingdeĝen, Ĝjangŝji-provinco, en Ĵuan-dinastio (1271-1368).

En la supra parto estas gravurita furioza drako kun larĝe mal-

fermita buŝo, du kornoj, maldika kolo kaj triungaj piedoj. La blanka drako vigle dancas en blujaj ondoj.

La vazo estas farita el glazuro brila kaj bonkvalita. Ĝi estas tre valora artaĵo.



Blue glazurita vazo kun gravurita blanka drako

81572

江南煙雨
丁巳年夏
畫

